

V-1903474 (1953)

EL POPOLA ĈINIO

人民中國報道



Jan. 1953

1953—Komenciĝas Nova Epoko por Ĉinio

La jaro 1953 signos la komencon de nova epoko en la longa historio de la ĉina popolo.

La restarigo de ĉina ekonomio post jardekoj da internaj kaj eksterlandaj militoj jam estas kompletigita. Nun ĉiuj energioj turniĝas al grandskala, laŭplana ekonomia konstruo, kiu celas transformi Ĉinion—el lando agrikultura en landon industriian.

Dum la tri jaroj post kiam ili fondis sian propran ŝtaton kaj registaron, la liberigita ĉina popolo jam sin okupis en du gigantaj taskoj t.e. helpado al la korea popolo repeli la Usonan invadon kiu jam minacis iliajn proprajn landlimojn, kaj rekonstruado de politika, ekonomia kaj kultura vivado de la popolo.

Ambaŭ taskoj bone plenumiĝis. En Koreio, la invadantoj estis repuŝitaj al la 38-a Paralelo, kun grandnombro da viktimoj. En la hejmlando, la agrara reformo inter 428 milionoj da kamparaj loĝantoj jam kompletigis, agrikulturo kaj industrio atingis, kaj, en certaj fakoj, eĉ superis la antaŭmilitan produkt-nivelon, la budĝeto ekvilibriĝis, varprezoj stabiliĝis kaj estas konstruitaj novaj fervojoj, ŝoseoj, fabrikoj, minejoj kaj gigantaj akvokonservaj konstruaĵoj. La salajroj de ĉinaj laboristoj en diversaj industrioj jam leviĝis je procentoj inter 65 kaj 120, depost 1949, kaj la enspezoj de kamparanoj plialtiĝis ankoraŭ pli multe. Granda forto kaj penado estas dediĉitaj al analfabeteco-likvidado. Edukado, literaturo kaj arto estas florantaj.

Tamen, la ekonomia konsekvencoj de jarcentoj da misregado ne estas tute konkeritaj en mallonga daŭro de tri jaroj. Ĉinio estas ankoraŭ malforta industrie. Por plie disvolvi produktadon, por konstrui pli prosperan, pli fortan landon, ni bezonas multajn fabrikojn kaj minejojn—kaj ni devas re-ekipi la nunajn per la plej freŝdataj ekipaĵoj. Antaŭ ĉio, Ĉinio devas konstrui pezan industrian—esenca necesajo por rapida industriiĝo.


La tasko ĉe ni estas, tial, de giganta amplekso. Sed la ĉina popolo havas plenan konvinkon pri tio, ke ili povas ĝin plenumi kaj bone plenumi. Iliaj memfidoj ja baziĝas sur certaj kaj solidaj fundamentoj—la abundaj naturaj riĉfontoj de sia lando, la kreema iniciativo de centoj da milionoj da liberigitaj viroj kaj virinoj, la supereco de la popol-demokratia ŝtatsistemo, la prudenta gvidado de la Ĉina Komunista Partio estrita de Prezidanto Maŭ Ze-tung, la sinoferema helpado de la Sovetunio kaj la solida unuiĝo kun la tuta tendaro de paco kaj demokratio.

Por plenumi la laboron kiu kuŝas antaŭ si, la ĉina popolo bezonas pacon tra la mondo. Milito kunportas detruon. Konstruado bezonas pacan cirkonstancon. La ĉina popolo amas pacon ĉar iliaj esperoj por la estonteco estas nepartigeble kunligitaj kun ĝi. Tio estas la kaŭzo, pro kio la ĉina popolo konsideras kiel sian devon daŭre batali por justa kaj racia solvo de la korea demando, postuli tujan ĉeson de la batalo kaj krome, malkaŝi la provojn de tiuj, kiuj ĉiamaniere daŭras saboti la armisticean intertraktadon kaj intencas pli-

disvastigi la militon.

Tio ankaŭ klarigas, kial la ĉina popolo ludas aktivan rolon en la pacdefendo ĉie, kaj kial ili subtenas la decidojn kaj ĝojas pro la sukcesoj de la Kongreso de la Popoloj por Paco, kiu ĵus fermiĝis en Vieno. La ĉina popolo kredas, ke paca kun-ekzistado inter landoj, kiuj havas malsamajn politikajn kaj ekonomiajn sistemojn, estas ne nur ebla, sed ankaŭ necesa, kaj ili estas pretaj havi komercajn rilatojn kun aliaj landoj surbaze de egaleco kaj reciproka profito.

Industriiĝo certe alportos prosperon kaj feliĉon al la 475 milionoj da ĉina popolo—kvarono de la homaro—kaj nepre kontribuos al la bonstato de la tuta homaro kaj al la sekureco kaj stabileco de la tuta mondo.



Kontraŭ la Neleĝa Rezolucio de U.N.

Kuna deklaracio de ĉinaj demokrataj partioj kontraŭ la neleĝa rezolucio pri la korea problemo aprobita de la Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj

Sen la partopreno de la delegitoj de la Ĉina Popola Respubliko kaj la Korea Demokratia Popola Respubliko, je la 3-a de decembro, 1952, la 7-a Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj aprobis laŭ la propono de Hindio kontraŭleĝan rezolucion pri la korea problemo, kiu, celante daŭrigon kaj plivastigon de la korea milito, estas la aliformiĝo de la sangsoifa propono de la Usona registaro perforte reteni koreajn kaj ĉinajn militkaptitojn rompante la Ĝenevan Konvencion rilate al militkaptitoj. En sia responda telegramo de la 14-a de decembro al S-ro Lester B. Pearson, Prezidanto de la Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj, Ministro por Eksterlandaj Aferoj Ĉou En-laj de la Centra Popola Registaro de la Ĉina Popola Respubliko severe refutis tiun absurdan kontraŭleĝan rezolucion kaj prezentis justan proponon de nia registaro pri paca solvo de la korea problemo sur bazo de justeco kaj racio. Ni esprimas nian tutfortan kaj unuaniman subtenon al la serioza sinteno kaj justa propono de nia registaro.

La armistika intertraktado en Koreio daŭris jam unu kaj duonon da jaroj. Dank' al la persista penado de la korea kaj ĉina flanko, la projekto de la korea armistika interkonsento estis atingita. Tamen, intencante daŭrigi kaj plivastigi la agresmiliton kontraŭ koreio kaj konservi internacian streĉecon por efektiviĝi sian intrigon de arma ekspansio, militpreparo kaj detruo de la paco, la Usona registaro intence fabrikis senraciajn pretekstojn de "volonta reenpatriigo" kaj "nedevisa reenpatriigo" por rompi la de ambaŭ flankoj interkonsentitajn regulojn pri resendo patrolanden de la militkaptitoj, perforte retenante grandnombron da koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj kaj daŭre farante sangajn krimagojn al ili per perforta kribrado, batado, tatuo kaj arbitra dispono. Ke ĝis nun la korea milito ne povas finiĝi kaj la arda aspiro por paco de la tutmondaj popoloj ne povas realiĝi, pri tio tute respondecas la Usona registaro pro ĝia praktiko de la krima politiko.

Kvankam la kontraŭleĝa rezolucio pri la korea problemo, kiun aprobis la Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj laŭ la propono de Hindio, forme vortludas per cito de la Ĝeneva Konvencio, tamen esence ĝi renversas la humanajn principojn de la Konvencio kaj plie rekte rompas la 118-an artikolon de la Konvencio, kiu klare difinas ke post la ĉesigo de milito ĉiuj militkaptitoj devas esti senkondiĉe liberigitaj kaj resenditaj patrolanden. La tiel nomata "oni ne devas perforte malhelpi aŭ devigi la militkaptitojn reiri hejmlanden" estas fakte ruzajo por subteni al la Usona registaro ĝian sovaĝan krimon de perforta reteno de grandnombro da koreaj kaj ĉinaj militkaptitoj. Tia absurda rezolucio neniel povas konduki al korea armistiko, ĝi nur serĉas pretekston por la krima intrigo de la Usona registaro por daŭrigi kaj plivastigi la agresmiliton kontraŭ Koreio. Tio estas firmvole kontraŭstarata de la tuta ĉina popolo.

En junio de 1950 la Usona registaro ekentreprenis la agresmiliton kontraŭ la korea popolo, kaj tuj poste

ĝi pelis siajn postsekvantojn en la Unuigitaj Nacioj partopreni tiun ĉi kriman agon. En februaro de 1952 ĝi direktis la Ĝeneralan Kunvenon de la Unuigitaj Nacioj aprobi la senhontan rezolucion kalumnii la Ĉinan Popolan Respublikon "agresanto". Nun la Usona registaro, celante fari pli kaj pli la Unuigitajn Naciojn ilo de sia agresa politiko, denove aprobis al ĝi absurdan rezolucion por perforte reteni militkaptitojn kontraŭe al la Ĝeneva Konvencio rilate al militkaptitoj. Tio estas tute netolerebla por la ĉina popolo kaj la tutmondaj popoloj pacamaj kaj je justeco insistaj.

La ĉina popolo arde amas pacon. Ni volas pacon por Ĉinio kaj pacon por Koreio. Ni volas daŭran pacon por la tuta mondo kaj la tuta homaro. Ni ĉiam insistas pacan solvon de la korea problemo sur bazo de justeco kaj racio. En sia telegramo al S-ro Lester B. Pearson, Prezidanto de la Ĝenerala Kunveno de la Unuigitaj Nacioj, Ministro por Eksterlandaj Aferoj Ĉou En-laj reprezentante la Centran Popolan Registaron de Ĉinio ankoraŭfoje prezentis justan proponon por paca solvo de la korea problemo kaj petis la Ĝeneralan Kunvenon de la Unuigitaj Nacioj, ke ĝi nuligu sian kontraŭleĝan rezolucion de la 3-a de decembro kaj postulu al la Usona registaro tuj redaŭrigi la intertraktadon ĉe Panmunjom, unue realigi plenan armisticon laŭ la projekto de la korea armistika interkonsento kaj poste transdoni por solvo la problemon pri resendo patrolanden de ĉiuj militkaptitoj al la "Komisiono por Paca Solvo de la Korea Problemo" kiun la Sovetia delegitaro proponis. Nur tiu ĉi rimedo estas la sola vojo kiu kondukas al la armistiko kaj efektiviĝo de paco en Koreio. Ni tute konsentas kaj firmvole subtenas la racian kaj justan proponon de la Centra Popola Registaro kaj alvokas al la tutlanda popolo persiste daŭrigi en plena unuigo la justan bataladon por rezisti Usonan agreson kaj helpi Koreion, kontraŭstari la absurdan kontraŭleĝan rezolucion de la Unuigitaj Nacioj, malkovri la intrigon de la Usona registaro por daŭrigo kaj plivastigo de la korea milito, kaj batali ĝisfine por la paca solvo de la korea problemo.

La Landa Komitato de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco
La Ĉina Komunista Partio
La Revolucia Komitato de Kuomintang
La Ĉina Demokratia Ligo
La Demokratata Nacikonstrua Asocio
Senpartiaj demokratoj de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco
La Ĉina Asocio por Akcelo de Demokratio
La Ĉina Kamparana kaj Laborista Demokratata Partio
La Ĉina Ĉi-Kung-Tang
La Ĉiŭ-San Societo
La Demokratata Aŭtonoma Ligo de Tajvan
La Novdemokratia Junula Ligo de Ĉinio

La 16-an de decembro, 1952

Masakro de Militkaptitoj sur la Insulo Pongam

— laŭ Usona informo —

Laŭ Usona informo, niaj kaptitoj mortpafitaj en la masakro sur la insulo Pongam plimultiĝis jam de 82 ĝis 87 homoj.

Malgraŭ ke la Usona flanko senhonte parolas pri tiu senprecedenca sanga krimo kiel 'ekribelo' de la militkaptitoj, la veron de la okazintaĵo jam malkaŝis Miller, Usona komandanto de la militkaptitejo sur la insulo Pongam kiu direktis la masakron.

Miller malkaŝe diris la 16an de decembro al ĵurnalistoj, ke unu semajnon antaŭ la okazintaĵo en la militkaptitejo jam estis "multe da malkvieto". Li diris ke li jam antaŭe ricevis averton pri la okazonta "ekribelo". Ne estus malfacile kompreni kial estis 'mutle da malkvieto' en la militkaptitejo, se oni konsiderus la vortojn de Miller kune kun la fakto ke Harrison, la malbonfama protagonisto de perforta detenado de la militkaptitoj, kun sekreta misio iris de Tokio al Pusan la 10an de decembro. *Associated Press* raportis, ke Harrison havis "sekretan mision en Pusan rilate militkaptitan problemon" kaj ke li "vizitos militkaptitejojn de la Unuigitaj Nacioj kaj inspektos la instalaĵojn en la haveno de Pusan". Oni povas klare vidi, ke "multe da malkvieto" en la militkaptitejo sur la insulo Pongam estiĝis pro intensiĝo de Usona agado deteni perforte la kaptitojn. La vizito de Harrison al Pusan evidente celis aranĝi translokigon el insulo Pongam de la granda nombro da militkaptitoj perforte detenataj tie. Por subpremi ilian reziston, Miller estis evidente ordonita prepari la amasbuĉadon. Tio estas averto pri la "ekribelo", kiun li ricevis.

La sanga buĉado komenciĝis la 14an de decembro, kiam la militkaptitoj videble rezistis la Usonan atencan ilin translokigi. Laŭ rakonto de Miller, la senarmitaj militkaptitoj estis puŝpremataj sur terason, kun siaj dorsoj kontraŭ la muro de la kazerno kaj pafitaj de la Usonaj soldatoj per ĉiusecaj armiloj.

Laŭ Miller, la militkaptitoj devis esti buĉataj, ĉar ili opiniis, ke "se nur sukcesus forkuri kelkaj homoj el la militkaptitejo, tio ja estus venko por ili," kaj tio "altigus la prestiĝon" de la buĉistoj kia Miller Usonaj agresantoj evidente timas, ke la kaptitoj, kiuj eskapus el la buĉejo, pli ĝisfunde malkovrus la krimagon de Usona perforta detenado. Tial oni decidis fermi al ili la buŝon per buĉado.

Senintence en sia aserto Miller elmontris la profunde kortuŝan kaj inspiran heroaĵon montrita de la kaptitoj en ilia firma senmorta rezistado kontraŭ la Usona politiko de perforta detenado. Miller diris, ke dum la amasbuĉado, la militkaptitoj "staris rektaj kaj ne provis eviti la kuglojn de malpezaj maŝinpafiloj, ŝroto-pafiloj*, karabenoj kaj fusiloj je malpli ol 30 jardoj. Kelkaj homoj intencis korpe batali kontraŭ la gardantaj soldatoj de Unuigitaj Nacioj armeo". "Ili kantis kaj sin balancis tien kaj reen. Post nia unua salvo, la vunditoj estis tenataj vertikale kaj daŭre kantis. Tiuj, kiuj falis teren, estis levitaj per iliaj brakoj." Ili kantis "komunistajn kantojn, kriis sloganojn, laŭte aŭdigis vivu-ojn." Eĉ mortigitaj aŭ vunditaj ili estis ankoraŭ unuigitaj kaj neniam ŝanceliĝis, "Unu vundito ankoraŭ provis kanti kiam li estis portata al la hospitalo sur Koĵe-insulo 10 mejlojn for." La vunditaj kaj mortintaj kaptitoj "kuŝis sur la tero

brakon en brako." "Niaj homoj devis ilin apartigi. Necesas du homoj por disigi kaj fortreni unu militkaptiton." Niaj kaptitoj nudmanaj brave kaj obstine bataladis kontraŭ la brutaj malamiko, kiuj ĝis-dente sin armis.

Tiele eĉ la malmultaj faktoj konfesitaj de la dungita buĉisto Miller, plene malkaŝis la senhontan mensogon de Usona flanko pri al tiel nomata "ribelo" de la militkaptitoj. Ili montras la krimagon faritan de Usono en ĝia politiko de perforta detenado de la militkaptitoj. La observantoj ĉe Kaesong konkludis, ke la Pongam-insula masakro estas la rekta produkto de la kontraŭleĝa rezolucio pri Koreio de la Ĝenerala Kunsido de la Unuigitaj Nacioj. Ĉar la politiko de perforta detenado de la malliberuloj post la masko de tiel nomata "memvola reenpatriigo" aŭ "nedevida reenpatriigo" estis plene aprobita de la kontraŭleĝa rezolucio de la Unuigitaj Nacioj, tial Usono kuraĝas sentime perforte deteni la militkaptitojn je pli granda skalo, kaj transdoni ilin al la banditojn de Syngman Rhee kaj Ĉiang Kaj-ŝek, plenumante la intrigon de Eisenhower "uzi azianojn por batali kontraŭ azianoj". Ĉiuj, kiuj voĉdonis, kontraŭ la homa konscienco, por la kontraŭleĝa rezolucio en la Ĝenerala Kunsido, devas preni seriozan respondecon por ĉiu guto da sango verŝita de la militkaptitoj sur la insulo Pongam.

* *Pafilo por pafi en salvo, angle 'shotgun'.*

Mil Milionoj Celas al la Sama Celo

Aj Ĉing

Jubila kanto flugas de loko al loko,
Bela espero vibras en la kantsonoro.
Pri la printempo de la patroland' ni kantas;
Pompadas nia vivo kiel freŝa floro.
Resonas kampoj kaj fabrikoj de kantvoĉoj,
La vasta tero banas sin en suna oro.

Gvidate de komuna kredo,
Ni marŝas firmavole, forgesante lacon.
Mil milionoj celas al la sama celo:
Defendi la konstantan pacon.

Jam la mondpacon rompas la militagentoj
Por la riĉiĝo de plenmano da friponoj.
Nun sub la skurĝ' de Marso Koreio ĝemas,
Kaj perdas sian vivon tutaj milionoj.
Kun flamo de indigno en la koro luktas
Heroe la popolo antaŭ la kanonoj.

Gvidate de komuna kredo,
Ni marŝas firmavole, forgesante lacon.
Mil milionoj celas al la sama celo:
Defendi la konstantan pacon.

Kiel potenca estas nia regimento,
De diversaj popoloj kuna fort' giganta!
Jen ŝaŭmas, bruas la ondar' de pacmovado,
Marego de milvala akvo kunfluanta.
Estingu tuj la militfajron, ke la mondo
Saviĝu de la pesto ĉiodetruanta!

Gvidate de komuna kredo
Ni marŝas firmavole, forgesante lacon.
Mil milionoj celas al la sama celo:
Defendi la konstantan pacon.

Tradukis S. J. Zee

Subjugado de Huaj-rivero Marŝas al Pli Granda Venko

— Skizo de Ĝia Triajara Laboro —

Maŭ Fu-kjun k Li Ĵen-ĵi

Baldaŭ komenciĝos plenskale la triajara laboro de la subjugado de la Huaj-rivero. Ĝi estos la jaro en kiu la subjuga laboro de la Huaj-rivero akiros pli grandan venkon.

La plano de la triajara laboro estas fiksita, kiel antaŭe, laŭ la politiko de ambaŭ konservo kaj forkonduko indikita en la *Decido pri la Subjugado de la Huaj-rivero* de la Administra Konsilo de la Centra Popola Registaro.

La ĉefaj konstrulaboroj de ĉi tiu jaro inkludas la sekvantajn flankojn:

Akvokonservaj kaj Akvoreguligaj Laboroj

1. Konstrui plie ses grandajn akvo-konservejojn en la valoj. La akvo-konservejoj entute kapablos enteni 3,600,000,000 kubmetrojn da inundakvo, irigacii proksimume 2,200,000 muojn da agro kaj produkti pli ol 7,000 kilovatojn da elektro. Inter ili la Poŝan-akvokonservejo kaj la Nanvan-akvokonservejo fundamente kompletigis en la jaro 1953. Sed la Fuzeling-akvokonservejo, la Tapoling-akvokonservejo, la Lungŝan-akvokonservejo kaj la Mejŝan-akvokonservejo estos kompletigitaj en 1954. Ĉiuj ĉi tiuj ses akvokonservejoj estos pli grandskalaj ol la antaŭaj kaj postulos pli altan teknikon. Ekzemple, la ferbetona arkada digo konstruota ĉe la Fuzeling-akvokonservejo longos je 516 metroj kaj altos je 70 metroj. La riverbara digo ĉe Mejŝan-akvokonservejo altos je pli ol 60 metroj kaj la plej granda volumeno de akvo entenota atingos 860,000,000 kubmetrojn.

2. Daŭrigi la kompletigon de lago-akvokonservejoj en Anhuej-provinco en la meza baseno de la Huaj-rivero. En la unua kaj dua jaroj de subjugado de la Huaj-rivero jam konstruiĝis unu post la alia la Ĵunhoĝi-kluzo (reguliganta la akvon en Ĉengsi-lago kaj sep aliaj lagoj kaj tiun en la malalta tereno) kaj la Tungfeĵo-kluzo (reguliganta la akvon en la Vapu-lago). En la tria jaro estos konstruita ĉe la Nipo-transirejo de la Ĉengtung-lago oriente de Hoĉiu-gubernio 40 metrojn longa kluzdigo kun 5 kluzpordoj kiu, kapablanta tute reguligi la akvon en la Ĉengtung-lago povos malaltigi la akvo-nivelon dum la inunda periodo de ĉiu jaro kaj plifaciligi la ŝiptrafikon kaj irigacion. Krome, ĉe Vangĉiapa, la akvo-enfluejo de la malalta tereno de la Meng-rivero en Funan-gubernio konstruiĝos 116 metrojn longa, granda kluzdigo kun dek tri kluzpordoj. Dank' al ĝia helpo la malalta tereno de la Meng-rivero povos reteni 750,000,000 kubmetrojn da inundakvo dum la jaroj de eksterordinara fluvolumeno kaj garantii la rikolton de grenoj en 280,000 muoj en la akvokonserva areo dum la jaroj de ordinara fluvolumeno kiam la konservo de akvo estas ne bezonata. Krom la konstruo de kluzoj por reguligi inundakvon, la terasoj* de la vilaĝoj en la akvokonservaj regionoj estos plialtigitaj por ke la popolanoj en tiuj regionoj ne suferu ne necesajn perdojn.

3. Entrepreni la grandiozan, inundakvo-konservan laboron ĉe la Hungze-lago. La konstrua laboro de lago-akvokonservejo ĉe la Hungze-lago estas la plej granda en sia speco en la subjugado de la Huaj-rivero, kies ĉefa parto estos la konstruo de la Sanho-kluzdigo ĉe Sanhokoŭ proksime de Ĉiangpa sude de Kaŭliangĉien sur la orienta bordo de la Hungze-lago. Post ĝia finkonstruo la akvo de la Hungze-lago povos esti tiel reguligata kaj retenata ke ne nur malpliigos la minaco de inundakvo al la digo de la Granda Kanalo kaj tiele garantiigos la rikolto de grenoj en la regiono de la malsupra baseno en norda Kiangsu-provinco, sed samtempe la retenata akvo povos ankaŭ enflui en la Ĉefan Irigacian Kanalon de norda Kiangsu tra la jam konstruita Kaŭliangĉien-kluzo por irigacii la vastan kamparon en la norda Kiangsu-provinco. La Sanho-kluzdigo longos je 700 metroj, kun 63 kluzpordoj. Estante nur malpli longa ol la kluzdigo ĉe la King-rivero en la meza parto de la Jangze-rivero, ĝi estos la dua granda kluzo en Ĉinio por la nuna tempo. Laŭ la plano la konstrua laboro de ĉi tiu granda kluzo estos kompletigita antaŭ la somera inundo-sezono de 1953.

4. En la unua jaro de la subjugado de la Huaj-rivero en Honan-provinco, sep kluzdigoj estis konstruitaj por la enfluo kaj elfluo de akvo en la kvar malaltaj terenoj de Vusung-lago, Kiaŭting-lago, Laŭvang-deklivo kaj Tung-lago. Nun estas decidite en la tria jaro konstrui tri kluzdigojn plie kaj dragi la kondukriverojn por plibone bridi la inundakvon kaj pligrandigi la kapablon de inundakvo-konservo.

Ordigaj Laboroj de Riveroj

En la tria jaro la ordigaj laboroj de la ĉefa fluo kaj multaj branĉoj de Huaj-rivero estos daŭrigataj gravpunkte kaj paŝon-post-paŝe.

Koncerne la ordigon de la ĉefa fluo de la Huaj-rivero estas du gravaj taskoj: Daŭre kompletigi la monthakadon por disfluigo de la ĉefa fluo kaj branĉoj de la Huaj-rivero oriente de Vuho-gubernio kaj fosi okcidente de Pokang 15 liojn longan Pokang-kondukriveron kun 530 metrojn larĝa riverfundo, kie estos elfositaj laŭ antaŭkalkulo 27,000,000 kubmetroj da tero. Krome estos konstruitaj riverbaraj terdigoj ĉe Jaŭho, Pokang kaj Ŝiacaŭvan. Post la kompletigo de ĉi tiu laboro, la branĉoj de la Huaj-rivero Kuej, To, Tang, Ĉung kaj Tung, povos esti disigitaj de la ĉefa fluo kaj rekte flui en la Hungze-lagon. Kun la aldono de la diverslokaj fosajoj kaj kluzoj de nun konstruotaj unu post la alia, la longe ne malhelpbla inundado pro neebleco de elfluo en la subregiono de Su-gubernio en Anhuej-provinco povos esti fundamente eliminata. Alia ordiga laboro de la ĉefa fluo de la Huaj-rivero estos dragi la elfluejon al Jangze-rivero. En la tria jaro estos unue dragita parto de obstaklo ĉe la buŝo de la Ŝaŭpaj-lago ĝis Luĉa, bone preparante por la grandskala mekanika dragado en la kvara jaro.

La plano de la draga kaj ordiga laboro por la branĉoj de la Huaj-rivero estas dragi kaj ordigi pli ol 30 riverojn en la supra, meza kaj malsupra valoj. Ĝi inkludas la riverojn Jing (supra parto), Ĉingĵi, Vukungĉju, Hung, Fen, Ni, Huejzi, Kiahuejĉju kaj Paŭ en la supra valo en Honan-provinco, la riverojn Ĉjuan, Kuej, Pejfej, Ĉung, Tung, Nihej kaj Jaŭ en Anhuej-provinco, kaj en norda Kiangsu-provinco ĉefe la elfoson de akvokonduka kanalo al la Flava Maro, norde

kaj laŭlonge de la Ĉefa Irigacio Kanalo por solvi la problemon forkonduki pluvoakvon el la regiono de 1,400 kvadrataj kilometroj norde de ĉi tiu kanalo. Inter ĉi supraj ordigaj laboroj de riverujoj, iuj jam komenciĝis en la dua jaro kaj aliaj komenciĝos en la tria.

Disvolvo de Akvo-utiligoj

En la tria jaro la forto koncentriĝos tiuflanke ĉefe en la pligrandigo de la jam komencita irigacia konstruado kaj parta ekkonstruo de navigeblaj vojoj. En la dua jaro jam kompletigis la fosado de la Ĉefa Irigacia Kanalo en norda Kiangsu, metante la unuapazan fundamenton por la utiliga laboro en la irigacia regiono tie. En la tria jaro konstruiĝos reguliga kluzdigo sude de Huaj-an kaj tajdbara kluzdigo ĉe Liuto, la buŝo de la Ĉefa Irigacia Kanalo, por malebligi enflon de la tajdakvo. Krome, de la jam konstruitaj Panĉiaŭ-akvokonservejo kaj Pajĉa-akvokonservejo en Honan-provinco elfosiĝos irigaciaj kanaloj, kreante irigaciajn regionojn de la akvokonservejoj.

Por disvolvi ŝiptrafikon, unue konstruiĝos en la tria jaro vico da ŝipkluzoj en la ĉefa fluo de la Huaj-rivero kaj parto de ĝiaj branĉoj. Dum multaj jaroj jam ne eblis la ŝipveturado inter la Jangze-rivero kaj la internaj riveroj de norda Kiangsu-provinco kaj inter la supra kaj meza valoj de la Huaj-rivero. Kiam tiuj ŝipkluzoj estos finkonstruitaj, estiĝos sendube tute nova aspekto en la ŝiptrafiko sur la Huaj-rivero. La malgrandaj vaporŝipoj de la Jangze-rivero povos veturi en la internajn riverojn rekte al Tungtaj, Ŝinghua, Jienĉeng, Funing kaj aliaj urboj; kaj la malgrandaj vaporŝipoj kaj lignaj ŝipoj de la Jangze-rivero kaj la Ĉefa Irigacia Kanalo de norda Kiangsu povos veturi tra la Huaj-an-ŝipkluzo, Kaŭliangĉien-ŝipkluzo kaj laŭlonge de la ĉefa fluo de la Huaj-rivero rekte al Ulungĉi en Honan-provinco. Sekve de tio la interfluo de varoj inter la Huaj-baseno kaj la malsupra valo de la Jangze-rivero ricevos pluan disvolviĝon.

Agrikulturaj akvoutiligaj laboroj de popolamasa karaktero, ĉefe elfoso de fosajoj, konstruo de digoj, forkonduko de akvo kaj irigacio, estas relative kompleksaj laboroj. Tamen en la pasintaj du jaroj jam rikoltiĝis iom da sukceso. Por unuigi la gvidadon de la vasta popolamaso por entrepreni ĉi tiujn laborojn, la Direktejo por la Subjugado de la Huaj-rivero speciale starigis Sekcion de Agrikultura Akvoutiligo, kiu decidis elekti en la tria jaro la regionon de 230 kvadrataj kilometroj en la supra kaj meza valoj de la Suj-rivero kaj la malsupran valon de la Pejfej-rivero, kiel gravajn punktojn por entrepreni modelajn, agrikulturajn akvoutiligajn laborojn, celante akiri el ili poste sperton por la plena disvolviĝo de tiaj laboroj en 1954.

Konkludo

Ĉi sube estas la ĉefaj trajtoj de la triajara laboro de la subjugado de la Huaj-rivero:

Unue, la tuta subjuga laboro marŝos en novan stadion. La kontraŭnunda konstruado finiĝos kaj komenciĝos plurcelaj laboroj por la disvolviĝo de akvoutiligo de la Huaj-rivero. En la pasintaj du jaroj, pro la urĝa bezono por liberigi la popolanojn loĝantajn laŭlonge de ambaŭ bordoj de la Huaj-rivero de katastrofo, 50% de la tuta antaŭdecidita inundretna laboro estis kompletigitaj kun tre granda bonefiko. Kiam la inundretna laboro de la tria jaro estos kompletigita, 87% de la antaŭdecidita tiuspeca laboro estos plenumitaj. Pro tio en la subjuga laboro en la tria jaro, grandskalaj

akvoutiligaj laboroj povos disvolviĝi pli plene ol en la pasintaj du jaroj. La multaj akvokonservaj konstruoj interligitaj de la branĉaj irigaciaj kanaloj kun la Ĉefa Irigacia Kanalo de norda Kiangsu en la malsupra baseno de la Huaj-rivero kaj la elfosado de branĉaj kanaloj por la Panĉiaŭ-akvokonservejo kaj Pajĉa-akvokonservejo en la supra baseno de la Huaj-rivero ĉiuj disvolvos la irigacian efikon de ĉi tiuj kanaloj kaj akvokonservejoj. Por disvolvi la ŝiptrafikon de la Huaj-rivero kvin ŝipkluzoj estos konstruitaj en Anhuej-provinco kaj norda Kiangsu-provinco. Krom tio, la gravpunkta entrepreno de agrikulturaj akvoutiligaj laboroj (akvoforkonduko, irigacio, k. t. p.). Ĉiuj ĉi tiuj laboroj alportos al la popolanoj sur ambaŭ bordoj de la Huaj-rivero senliman feliĉon.

Due, teknikaj laboroj plimultiĝos ol antaŭe. En la subjuga laboro de la pasintaj du jaroj, terfosa laboro estis relative pli multa (ekzemple: plialtigi digojn, ordigi riverujojn, k.t.p.). En tiuj du jaroj nur kompletigis tri akvokonservejoj, sed en la tria jaro konstruiĝos ses akvokonservejoj kaj pli ol 50 diversspecaj kluzdigoj. Ĉi tiuj akvokonservejoj kaj kluzoj estos pli grandskalaj kaj pli altteknikaj, kaj tio montras la saltegantian disvolviĝon kaj progreson en akvokonservado de nova Ĉinio. Ke la pli altteknikaj laboroj povos plimultiĝi laŭ la bezono de la tuta subjuga laboro estas pro la utiligo de la progresaj spertoj de Sovetunio kaj la abundaj spertoj akiritaj de la tuta laborantaro en la Huaj-subjugado dum la pasintaj du jaroj. Ekzemple la plano de la Sanho-kluzdigo estas farita utiligante la Sovetian sperton de kluzkonstruo sen palisoj kaj la konkretan sperton en la konstruado de la Ĵunhoĝi-kluzdigo. Alie, estus neeble ke la Sanho-kluzdigo estu kompletigita antaŭ la inundsezono de 1953.

La skalo de la triajara laboro de la subjugado de la Huaj-rivero estas grandioza kaj malfacilega, sed ni kredas ke laborante surbaze de la venkoj en la pasintaj du jaroj, ni certe akiros pli grandan venkon.

Trad. Ma Dion

* *Altigitaj teramasoj sur kiuj la kamparanoj en la ĉiam inundataj regionoj konstruas siajn domojn.*

† *Kanaloj elfositaj de la turniĝoj de la rivero por mallongigi la riverojn.*

Ĉu Privata Entrepreno Povos...

(daŭrigo de p. 10)

la liberiĝo fariĝis metilernanto en la fabriko. Laborinte apenaŭ du jarojn, li jam kreeme plibonigis iun ilon por fari rulfrotingon kaj per tio altigas la produktan efikecon duoble. Dank' al la aktiva kreemo de la laboristoj, la fabriko sukcesis produkti rapidumon, rulfrotingon, kaj la dentradon en granda aŭtomobilo, kiujn ili ne kapablis produkti en la pasinteco.

Post la movado de "kvin kontraŭ" la kapitalistoj de Sinĉung-maŝinfabriko fariĝis pli memkonfida kaj esperplena en la entrepreno. La ĝenerala administranto, kiu malmulte zorgis la fabrikon en la pasinteco, venas ĉiutage al la oficejo. Nunmomente la laboristoj kaj la kapitalistoj estas prilaborantaj planon por solvi tiujn problemojn kiuj estis trovitaj dum la movado de "kvin kontraŭ". La problemoj pri nesufiĉa interligado inter diversaj sekcioj, manko en la laborsistemo, neraciececo en la produkta organizo, kaj kiel bone utiligi la kaŝitan produktopovon estos solvitaj en la konsiliga konferenco inter laboristoj kaj kapitalistoj.

Trad. Honĉo

La Kulturaj Laborantoj de Ĉinio

Sidney Shapiro

Kulturaj laborantoj ĉiam estas objektoj de korinklino kaj admiro, de post ili komencis siajn agadojn frue en la revolucio. Kiel ilia titolo signifas, ili estas profesiaj laborantoj en la kampo de kulturo. Ĉiuj estas membroj de aŭ privataj aŭ ŝtataj organizoj, nuntempe kunligitaj per diversaj asocioj.

En Ĉinio hodiaŭ la vorto "kulturo" inkluzivas arton, literaturon, dramon, filmudon, dancon, muzikon kaj edukadon de plenaĝuloj. Kiel ĉiuj entreprenadoj en nova Ĉinio, la fundamenta funkcio de kulturo estas servi la popolon—servi la laboristojn, kamparanojn, kaj la soldatojn. En la kazo de kulturo tiu ĉi servo estas ĉefe donata per la utiligado de la kulturaj periloj por provizi politikan kaj praktikan edukadon al la popolamasoj laŭ la vidpunkto de la laboristoj.

Estas multe pli postulate al kultura laboranto ol nur teknika kapableco. Studadoj, teoria kaj praktika, estas konstantaj. La unua inkluzivas la kulture heredaĵon de Ĉinio kaj de aliaj landoj: marksismo-leninismo, la principoj de Maŭ Ze-tung kaj ĝisfunda kompreno de la nuntempa politiko.

Praktika studado konsistas el vivado kaj laborado kun la popolanoj, rekta partoprenado en iliaj luktoj kaj movadoj. La "laboranto"-parto de kultura laboranto signifas ĝuste tion. Krom la ĉarmaj skulptaĵoj vendataj en butikoj de kuriozaĵoj, ne ekzistas aliaj eburoturoj en nova Ĉinio. Ĉiu ebleco estas donata al tiuj kulturaj laborantoj ne daŭre interligitaj al laborista, kamparana aŭ soldata organizo por fari oftajn kaj longajn vizitojn al fabrikoj, kamparo kaj militaj instalaĵoj.

Krom aranĝo de prezentaĵoj kaj ekspozicioj, la profesiuloj kuraĝigas la disvolviĝon de la arta kaj literatura kreivo de la popolo. Klerigaj kursoj estas donataj en partatempaj lernejoj; dramotrupoj de amatoroj estas formitaj, ĝermantaj artistoj, muzikistoj kaj verkistoj ricevas teknikan helpon.

La celo de la stimulado de la aktiveco de la popolamaso en aferoj kulturaj, kun escepto de okazoj, kie neordinara talento estas trovita, ne estas, kompreneble, provi ŝanĝi ĉiun en grandan verkiston, pentriston aŭ komponiston; tiu ĉi aktiveco ankaŭ estas neniam tiel ampleksa, ke ĝi malhelpas produktadon. Tio, kio estas intencita, estas vastiĝo de la aprezo de literaturo kaj artoj en la popolo, tiel ke, plenumante la kulturajn bezonojn de la popolo, tiuj ĉi rimedoj povas ankaŭ efektive servi kiel iloj de populara politika edukado.

Samtempe, la profesiuloj, komplete iĝante parto de la laboristoj, kamparanoj kaj soldatoj, lernas pensi kaj senti kiel la granda plimulto de la popolanoj, dum la kulturaj verkoj, kiujn la popolanoj kreas el sia ĉiutaga vivo, provizas riĉan fontmaterialon.

Do, estas el la popolo, ke ĉina kulturo ĉerpas sian forton, kaj estas por la popolo, ke ĉina kulturo estas kreata. De la plej frua komenco de la revolucio, la kantoj, la teatraĵoj, la noveloj, la pentraĵoj, la poemoj

—analizantaj la pasinteco, klarigantaj kurantajn movadojn kaj aferojn, fikantaj la celojn de la estonteco—estis verkitaj en la riĉa lingvo de la laboristo, kamparano kaj soldato kaj prezentataj en la formoj plej ŝatataj de la popolo.

Eĉ antaŭ ol tuta Ĉinio estis liberigita, kulturaj laborantoj jam estis en la mezo de ĉiu batalo, milita kaj ideologia. Dum en la malnovaj liberigitaj regionoj la popolopero "Blankhara Knabino" elvokis larmojn de bolanta furiozo kontraŭ la malvirteco de la feŭda bienulsistemo, subtilaj verkoj konsilantaj solidarecon por renversi ambaŭ la hejmlandan tiranecon kaj la sklavecon al fremdaj potencoj estis produktataj en la de Kuomintang kontrolataj ĉefcentroj sub la nazoj de la superruzitaj cenzuristoj. Spritaj, frapantaj versaĵoj, kantoj kaj afiŝoj faris la homojn de la Popola Liberiga Armeo subridi pri la furioza interpuŝado de la Ĉiang Kaj-ŝek-aj faŝistoj, kaj igis milojn da kamparanoj perforte soldatigitaj de Kuomintang transiri al la flanko de la revolucio portante siajn Usonajn ekipaĵojn.

Post la liberigo de la tuta lando, la kulturaj laborantoj ĵetis sin en la tutlandajn amasmovadojn—Agrara Reformo, Subpremo de Kontraŭrevoluciuloj, Pliprodukto kaj Ŝparo, Helpi Koreion kaj Rezisti Usonan Imperiismon; kaj Kontraŭ Koruptiĝo, Malŝparo kaj Burokratismo—kaj pliintensigis sian fajron kontraŭ tiaj sociaj postsignoj de jarcentoj da feŭdismo kiaj mallegeco inter viroj kaj virinoj, manko de higieno, superstiĉo kaj analfabeteo.

Apenaŭ troviĝas viro, virino aŭ infano en Ĉinio, kiu ne estas intime familiara kun ĉiu fazo kaj faceto de tiuj ĉi movadoj, kaj intelektu konvinkita pri ilia neceso same kiel pri ilia interrilato. La ĉina popolo aŭdas pri ili kaj vidas ilin en ĉiu kultura medio, ili kantas pri ili en popularaj kantoj. Klarigoj pri la movadoj estas enkorpiĝitaj en la lernmaterialo de la klerigaj kursoj.

La rezultoj de la laboro de la kulturaj laborantoj de Ĉinio povas esti nur priskribataj kiel grandegaj. Preskaŭ duona miliardo da popolanoj—pli kaj pli kleraj, kulturitaj, bone informitaj—nun facile distingas siajn amikojn de siaj malamikoj.

La ĉinaj popolanoj deziras pacon, prosperon kaj finon al la ekspluatado ĉie kaj iliaj kulturaj laborantoj instruas ilin kiel atingi tiujn ĉi celojn. Ĉu estas mirinde, ke Ĉinio frontas al la estonteco klarvide kaj memfide?

Trad. K. Maier



Antaŭen Marsas la Virinoj de Ĉinio

Teng Jing-ĉaŭ

Vicprezidanto de la Tutĉinia Federacio de Demokrataj Virinoj

Je la unua de oktobro, antaŭ tri jaroj, fondiĝis la Ĉina Popola Respubliko. La Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsultiĝa Konferenco klare kondiĉas: "La Ĉina Popola Respubliko devas aboli la feŭdan sistemon, kiu tenas virinojn en katenoj. Virinoj devas ĝui egalajn rajtojn kun viroj en politika, ekonomia, kultura, eduka kaj socia vivo. Libereco de geedziĝo por ambaŭ viroj kaj virinoj devas esti realiĝita." Diversaj gravaj leĝoj proklamitaj post la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko, ekz. La Geedziĝa Leĝo, La Agrara-Reforma Leĝo, La Regularo de Labor-Asekuro k.t.p., enkorpiĝas tiun ĉi spiriton kaj de diferencaj flankoj garantias per leĝoj la egalajn rajtojn de virinoj kun viroj. Sub la gvido de la Ĉina Komunista Partio, ĉiurangaj organizoj de la Federacio de Demokrataj Virinoj laŭ la politikoj de la registaro, jam sukcese mobilizas kaj organizas la grandan amason de virinoj partopreni socian laboron, tiel ke tiuj kiuj jam partoprenas socian produkton kaj socian laboron pli energie produktas kaj laboras kaj tiuj kiuj antaŭe ne sin okupis per laboro nun suriras la postenojn de socia produkto kaj socia laboro, fariĝante kreantoj de socia riĉeco kaj konstruantoj de nova Ĉinio. Tio helpas la restarigon kaj disvolviĝon de la politika, ekonomia, kultura entreprenoj de la patrio, kaj samtempe defundamente altigas staton de virino en la socio kaj la familio; tiel forigas la feŭdan katenigon al virinoj, protektas la laŭleĝajn interesojn de virinoj kaj infanoj kaj altigas la politikan, kulturalan kaj profesion nivelojn de virinoj. Tial, en movadoj de socireformo kaj en diversaj konstruentreprenoj de la patrio, la gvidanta principo estas samtempa mobilizo de ambaŭ viroj kaj virinoj, grandkvanta ensorbo de virinoj kaj protekto de la laŭleĝaj interesoj de virinoj. Ĉiurangaj organizoj de la Federacio de Demokrataj Virinoj direktas sian laboron ĉefe al la laboristaj kaj kamparanaj virinoj kaj aliaj laborulaj virinoj, kiuj antaŭ la liberiĝo estis la plej grave subpremitaj kaj la plej profunde suferintaj. La Federacio ankaŭ atentis pri solidareco inter virinoj de diversaj socitavoloj kaj diversaj nacioj, kiuj amas la patrolandon, amas pacon kaj amas demokration.

Dum la pasintaj tri jaroj, agante laŭ tiuj ĉi politikoj kaj principoj, la Federacio de Demokrataj Virinoj kaj siaj ĉiurangaj filioj, kunlaborante kun la koncernaj fakoj de la Popola Registaro kaj aliaj popolaj organizoj, ĉiuj per siaj respektivaj rimedoj, plemumas la taskon de eduko kaj disvolvigas la laboron inter la virina amaso. Sekve de la grandaj venkoj en la kampanjoj de Rezisto kontraŭ Usono kaj Helpe al Koreio, Agrara Reformo, Subpremo al la Kontraŭrevolucioj, kaj la movadoj de "Tri Kontraŭ" kaj "Kvin Kontraŭ", kaj la restariĝo kaj disvolviĝo en kampoj politika, ekonomia kaj kultura, tra la tuta lando, la feŭda sistemo kateninta virinojn estas nun rapide disrompiĝanta, la stato de la granda amaso de virinoj jam fundamente ŝanĝiĝis. El la stato de subpremato kaj sklavigato, ili fariĝis nun mastroj de nova Ĉinio, el la stato de malestimato kaj insultato, ili nun fariĝis civitaninoj kun samaj rajtoj kiel viroj. La specialaj postuloj de virinoj, kiuj antaŭe

suferis de neglekto kaj piedpremo, nun ricevas la prizorgon kaj protekton de la ŝtato.

Kiaj do estas la konkretaj rezultatoj akiritaj de la virina laboro en nova Ĉinio dum la pasintaj tri jaroj?

Egalaj Rajtoj de Virinoj kun Viroj

Unue, egalaj rajtoj de virinoj kun viroj jam paŝon post paŝo realiĝas. La konscio de la granda amaso de virinoj jam multe altiĝis. Ilia elrigardo jam pliampleksiĝis de la mallarĝa hejmo al la tuta nacio; ili arde amas sian familion, kaj ankaŭ pli arde amas sian patrion; ili nun partoprenas ĉiujn socireformojn kaj konstruadojn kun energia diligenteco kaj senlima fervoro same aktive kiel viroj. Jaron post jaro pligrandiĝas la nombro de fakoj en kiuj virinoj laboras kaj la nombro de virinoj laborantaj en ili. Kaj en la ŝtataj institucioj, lernejoj, ŝtataj entreprenoj, kooperativoj, ŝtataj farmoj, eminentaj agrikulturaj produktkooperativoj kaj la plej progresaj interhelpaj grupoj, virinoj jam fundamente akiris egalan staton kaj samgradan rekompencon kiel viroj.

En ŝtata administra laboro, estas virinoj kiuj partoprenas respondecajn laborojn en ĉiurangaj registaraj organizoj, kaj en ĉiurangaj konferencoj de popolrepresentantoj, estas certa nombro da virinaj delegitoj, kiuj jam sukcese plenumas siajn taskojn. La proporcio de virinoj en bazaj ŝtata administraj organizoj estas plej granda kaj la influo estas plej rimarkinda. Ekz., en la guberniaj konferencoj de popolrepresentantoj, la nombro de virinaj reprezentantoj ĉijare sumiĝas je 15% de la tuta nombro de la reprezentantoj, ĉirkaŭ 5% plimulte ol en 1950. En la Strataj Popolrepresentantaj Konferencoj de Pekino, la nombro de virinaj partoprenantoj estas 48%, 26% plimulte ol en 1950. En la bazaj popolaj registaroj, la nombro de virinoj ankaŭ estas konsiderinda. La plejparto el ili estas fidelaj kaj fidindaj en servo al la popolo. Pere de ili la opinioj kaj postuloj de ĉiuj familioj estas spegulitaj al la Popola Registaro, kaj la dekretoj kaj politikoj de la Registaro trovas siajn vojojn al ĉiuj familioj, tiel ke la fundamenta bazo de la popoldemokratio fariĝas pli kaj pli firma tagon post tago.

En la flanko de ekonomia konstruado, ne nur en malpezaj industriaj fakoj, en kiuj nun laboras granda nombro da virinoj, sed ankaŭ en pezaj industrioj, en komunikaj entreprenoj, en konstruado de nacidefendo, kie antaŭe troviĝis malmulte aŭ eĉ neniom da virinaj laborantoj, nun aperas novtipaj virinoj, kiel tornistinoj, veturigistinoj de tramoj, aŭtomobiloj kaj vagonaroj, aviadistinoj, paraŝutistinoj k.t.p., kiuj malfermas larĝan vojon por virinoj partopreni la konstruadon de la patrolando. Ĉijare, virinaj laboristinoj sumiĝas je naŭcent naŭdek mil, 74% plimulte ol en 1950. Ili nun per senparalela ardo, per aktiva laboremo, pensadas por trovi raciigajn metodojn, lernas kaj kreas multe da progresaj labormetodoj. La labormetodo de Ho Kjen-ŝiu, landkonata ŝpinistino, nun trovas popularecon en ĉiuj ŝpinejoj; ŝpinistinoj prenas kiel honoron ellerni

la metodon de Ho Kjen-ŝiu. Laŭ la statistikoj de 1951, laborherooj inter gelaboristoj en la tuta lando nombriĝas je pli ol 86,500, inter kiuj laborheroinoj konsistigas 8.9%.

En la ŝtataj industrioj multaj laboristinoj estas promociitaj al gvidantaj pozicioj. Nur en la Nordoriento kaj Orienta Ĉinio, ekde la liberiĝo, estas pli ol 6,400 laboristinoj kiuj estas promociitaj kiel administraciaj kadroj (direktoroj de laborejoj, estroj de fakoj, estroj de fabrikoj, k.t.p.) kaj gvidantaj laborantoj de la sindikatoj. La sistemo de sama rekompenco por sama laboro por viroj kaj virinoj estas efektivigita en ĉiuj ŝtataj industrioj kaj iliaj salajroj altiĝas jaron post jaro. Industrioj kun pli ol cent laboristoj jam realigas laboran asekuron, la specialaj malfacilaĵoj de laboristinoj estas aparte prizorgataj.

En la regionoj kun pli ol 420,000,000 agrikulturaj loĝantoj jam sukcese plenumiĝis la agrara reformo, kaj kampanoj akiris siajn porciojn da tero kaj fariĝis mastroj de la tero. Liberigitaj gekampanoj kun nekomperebla ĝojo laboras sur sia propra tero; en la plej granda parto de la vilaĝoj, jam estas pli ol 60% da laborpovaj virinoj kiuj partoprenas laboron sur la kampoj; apartaj regionoj eĉ atingas la altan proporcion de 90%. Ĉijare, la nombro de virinoj partoprenante agrikulturajn kooperativojn estas 40 ĝis 60 procentoj de la tuta sumo de virinoj partoprenantaj agrikulturan produkton. Inter ili aperis ne malmulte da superaj modeloj de riĉ-rikolto. Ekz., la tutlande konataj Leng Jue-ĵing kaj aliaj, estas honoritaj per premioj de la Agrikultura Ministerio de la Centra Registaro.

Sekve de la disvolviĝo de interhelpaj grupoj kaj agrikulturaj kooperativoj en la vilaĝoj, samtempe organiziĝas kaj disvastiĝas la infanzorgaj grupoj, kaj vartejoj dum la okupata sezono, tiel solvinte parton de la malfacilaĵoj de kampanoj. Scioj pri moderna obstetiko kaj pri moderna infanzorgo estas disvastigataj tiel ke la higiena laboro por patrinoj kaj infanoj estas plibonigita en la vilaĝoj. Malfermis klerigaj kursoj, kaj organiziĝis ĵurnalo-legaj grupoj, tiel ke la kultura nivelo de virinoj estas altigita. Multaj virinoj estas promociitaj al gvidantaj postenoj, fariĝante estrinoj de grupo aŭ kooperativoj (ekz., en Distrikto Ĉangĉe, Ŝansi-provinco, estas 95 virinaj prezidantoj aŭ vicprezidantoj el 118 agrikulturaj kooperativoj). Tiel, inaj membroj de la agrikulturaj kooperativoj diris kortuŝe, "Partopreninte la agrikulturan kooperativon, ĉiuj fariĝas sanaj, ĉu junaj ĉu maljunaj; prosperiĝas ambaŭ la homoj kaj la produkto; riĉiĝas la familioj kaj samtempe liberiĝas la virinoj. Estas ja multe pli bone ol labori sole." Krome, atento estas donita al trejno kaj eduko de virinaj teknikaj kadroj pri agrikulturo, lernigante ilin en la uzo de novtipaj terkulturiloj. En la ŝtataj farmoj jam aperas inaj traktoristoj kaj farm-direktoroj.

En la flankoj de kulturo, eduko kaj labordungiĝo, virinoj havas saman rajton kiel viroj. En la kampano de Rapida Ellerno de Ideografoj nun disvastiĝanta tra la tuta lando, estas pli multe da virinoj ol viroj inter la partoprenantoj; en la altgrada eduko, estas fundamente garantiite, per la proklamo fare de la Eduka Ministerio de la Centra Popola Registaro pri plivastigo de la sistemo de subvencio, ke viroj kaj virinoj ambaŭ havas la saman ŝancon aliĝi al studo kaj ne plu estas malhelpitaj per la feŭda tradicio ke "la viro estas pli supera kaj la virino pli malsupera". En la flanko de

labordungiĝo, virinoj ricevas specialan prizorgon laŭ la decido pri labordungiĝo publikigita de la Administracia Konsilo de la Centra Popola Registaro. En registaraj institucioj, la nombro de virinaj laborantoj plimultiĝas jaron post jaro (en la institucioj de la Centra Popola Registaro, laborantinoj estas 22% el la tuta laborantaro, 4% plimulte ol en la jaro 1949), kaj efektiviĝas la principo de sama rekompenco por sama laboro, kaj ankaŭ forpermeso antaŭ kaj post akuŝo kun regulara salajro estas efektivigita.

Libereco en Geedziĝo

Due, la rajto de libereco en geedziĝo estas garantiita per leĝo. La demokrataj kaj harmoniaj familioj estas en formiĝado. Ekde la unua de majo, 1950, kiam la Geedziĝa Leĝo estis proklamita, la Administracia Konsilo de la Centra Popola Registaro ankaŭ publikigis direktan pri kontrolo de la kondiĉo de la Geedziĝa Leĝo en plenumado, garantiante tiele per leĝo la rajton de la popolo en libereco de geedziĝo. Ĉiurangaj popolaj registaroj kaj ĉiurangaj popolaj organizoj faris inter la popolamaso propagandon kaj edukon pri la Geedziĝa Leĝo, kaj kontrolis la kondiĉon de ĝia plenumado. En regionoj kie la laboro estas bone farata la malnovtipa deviga geedziĝo fundamente malaperis. Virinoj havas la rajtojn edziniĝi, eksedziniĝi aŭ reedziniĝi. La kondiĉoj por esti elektita kiel amato aŭ amatino estas diligenteco en laboro, progresemo en penso. Demokrataj harmoniaj novaj familioj ĉie aperas. Ekz., en la Subprovinca Distrikto Fudĵang, Anhuej-provinco, de januaro ĝis aŭgusto en 1952, troviĝis pli ol 8,700 homoj geedziĝinte post libera enamiĝo, pli ol 3,000 reedziniĝintaj vidvinoj, kaj pli ol 95,300 familioj demokrataj kaj harmoniaj, kaj pli ol 2,400 paroj en libera enamiĝo. Gejunuloj kontente solvas siajn problemojn de geedziĝo. La virinoj kantas:

En la agrara reformo ni stariĝas;
Interhelpe kaj kunlabore ni riĉiĝas;
Propravole kaj propradecide ni edziniĝas,
Virinoj veraj homoj nun fariĝas.

Tiel, ĉu en politiko, ĉu en kulturo, ĉu en produkto, virinoj montras sin aktivaj kaj agemaj.

Sed en plejparto de la regionoj la laboro iris ankoraŭ ne kontentige, precipe tie kie la malnovaj juĝ-laborantoj kiuj rekte respondecas por la plenumo kaj propagando de la Geedziĝa Leĝo kaj la viraj kaj virinaj kadroj kiuj ankoraŭ konservas la feŭdan ideologion, grave malhelpas al la plena efektiviĝo de la Geedziĝa Leĝo. Forigi la feŭdan ideologion de tiuj ĉi laborantoj estas ŝlosilo por la universala plena efektivigo de la Geedziĝa Leĝo.

Protekto de Patrinoj kaj Infanoj

Trie, atento estas donita al la protekto de patrinoj kaj infanoj. La Komuna Programo de la Ĉina Popola Politika Konsiliĝa Konferenco kondiĉas ke la sano de patrinoj, infanoj kaj geknaboj estu protektita. En la Regularo de Labor-asekuro, estas reguloj pri speciala protekto al laboristinoj kaj edzinoj de laboristoj antaŭ kaj post akuŝo. Laboristinoj kaj familianoj de laboristoj same ĝuas protekton en nasko, maljunaĝo, malsaniĝo, morto, vundiĝo kaj kripliĝo. La koncernaj fakoj de la Popolaj Registaroj, ĉiurangaj filioj de la Federacio de Demokrataj Virinoj kaj la Tutlanda Komitato por Protekto al Infanoj jam penadas sub tiu ĉi principo. Tial dum la pasintaj tri jaroj, prospere disvastiĝas la entre-

(daŭrigo sur p. 23)

Ĉu Privata Entrepreno Povas Prosperi en Nova Ĉinio?

Ĉou Siang-jang

“Ĉu privata entrepreno povas prosperi en nova Ĉinio?” Oni povas trovi jesan respondon en la fakto ke la privata entrepreno Sinĉung-maŝinfabrika en Ŝanhajo ĉiam pli prosperas dum la tri jaroj post liberiĝo.

Antaŭ liberiĝo Sinĉung-maŝinfabrika havis laborantaron el nur cent naŭdek-kelkaj personoj. Sed nuntempe la laborantaro konsistas el preskaŭ kvarcent personoj. Pli ol kvardek labormaŝinoj estis nove instalitaj. La areo de la laborejo plivastigis kvardek procentojn. La malnovaj, malaltaj kaj malbonaj domoj estis anstataŭigitaj de novaj kaj altaj domoj el subferigita betono. Kaj elektra argano estis instalita. La efikeco de produktado estis altigita pli ol sesoble ol tiu antaŭ la liberiĝo.

Sinĉung-maŝinfabrika estis fondita antaŭ pli ol dudek jaroj, kaj estis unu el la pli grandaj maŝinfabrikaĵoj en Ŝanhajo en la pasinteco. Ĝi estis translokigita en internan parton de Ĉinio dum la rezistmilito kontraŭ Japanio. Iutempe ĝi prosperis ĝis tia grado ke ĝi havis laborantaron el preskaŭ mil personoj. Sed la fabriko prosperis sub la strangolo de imperiistoj kaj burokrataj kapitalistoj nur efemere. Precipe, post la venko de la rezistmilito Usonaj varoj fluis en Ĉinion kiel tajdo, sekve, Sinĉung-maŝinfabrika ne povis fabriki eĉ malgrandajn maŝinojn sub la puŝpremado de Usonaj produktaĵoj. Ekzemple, post la venko de la rezistmilito Sinĉung-maŝinfabrika fabrikis dek dek-ĉevalpovajn Diesel-motorojn, tamen la maŝinoj ja ne povis forvendiĝi dum tri jaroj. En tiu periodo la fabriko povis havi nek produktan celon, nek entreprenan planon. Ili povis fari nur tion, kio estis hazarde mendita.

Mallonge post la liberiĝo de Ŝanhajo la kapitalistoj de Sinĉung-maŝinfabrika estis ankoraŭ hezitema kaj dubema, kaj ne kuraĝis fari grandan entreprenon. Post nelonge, la Popola Registaro aĉetis multe da pretaj artikoloj kiujn ili longe konservis, kaj plie, mendis grandan kvanton da maŝinoj. Tiam la kapitalistoj ekrimarkis ke la privata industrio en nova Ĉinio havas brilan estontecon. De tiam ili ŝanĝis la vidpunkton, rigardi negocon pli grava ol produktado, kaj transigis la spertajn inĝenierojn el la oficejo al la laborejo, plifortigis la laboron de proĵektado kaj planado, kaj pli intimigis la interrilatojn inter la ĝenerala oficejo kaj la produktaj fakoj, per retranslokigo de la oficejo de ekstere en la fabrikon. La fabriko akceptis multe da mendoj de diverslokaj karbominejoj, elektrejoj kaj paperfabrikoj. La unuan jaron post liberiĝo Sinĉung-maŝinfabrika ne nur repagis la ŝuldojn, sed ankoraŭ havis profiton kaj akiris certan kvanton da materialo kaj ekipaĵo; la duan jaron, la profito estis pli ol 5,000,000,000 juanoj; la produktado de la tria jaro superis tiun de la dua jaro je pli ol kvindek procentoj. Antaŭe Sinĉung-maŝinfabrika kapablis fabriki nur malgrandajn aŭ simplajn instrumentojn. Post nur tri jaroj, la fabriko jam kapablas produkti kelkdek specojn da maŝinoj.

La ĉefa kaŭzo de la prosperiĝo de la fabriko post la liberiĝo estas ke oni faris serion da plibonigoj pri la administrado de la entrepreno kaj pri la rilatoj inter la laboristoj kaj la kapitalistoj. Post la liberiĝo Sinĉung-maŝinfabrika efektivigis la administran politikon “Vizaĝe al produktado kaj al konstruado.” Sub la gvidado kaj helpado de la Popola Registaro, ili plenumis la fabrikadon de multaj maŝinoj kiujn ili neniam antaŭe fabrikis. Kvankam tiu ĉi evoluo kaŭzis al la fabriko kelkajn novajn malfacilaĵojn rilate al ekipaĵo kaj tekniko, tamen la kapitalistoj kaj la laboristoj solvis la malfacilaĵojn per aktiveco. Dum lastaj tri jaroj, Sinĉung-maŝinfabrika pliigis la produktan ekipaĵon je pli ol 4,000,000,000 juanoj, aldonis al la labormaŝinaro pli ol kvardek novajn pecojn. Samtempe ili plifortigis la gvidadon al produktado, ekzemple, ili pli atentis al proponoj pri raciigoj, starigis sistemon de produktajo-ekzameno. Pro ĉio ĉi la produkta tekniko kaj la kvalito de produktaĵoj de la fabriko rimarkeble plibonigis. Tamen, antaŭ la movado de “kvin kontraŭ,” la administracio de Sinĉung-maŝinfabrika havis ankoraŭ fortan profitan vidpunkton. Ili neniam precize faris kostkalkulon. Por pli da profito, ili ofte tro alte kalkulis la produktkoston. Dum la movado de “kvin kontraŭ” la kapitalistoj de Sinĉung-maŝinfabrika memkritikis sian ekstreman profitecon kaj komencis priatenti la kalkulon de produktkosto. Sekve de tio, tri specialaj kontistoj de produktkosto estis dungitaj. Nuntempe la prezoj de la produktaĵoj estas ĉiuj fiksitaj sur la bazo de materialoj uzitaj, laboroj faritaj, kaj malrektaj elspezoj plus certa kvanto da profito. Pro ĉio ĉi multaj produktaĵoj fariĝis pli malkaraj ol antaŭ la movado de “kvin kontraŭ”. Ekzemple, la prezoj de pumpiloj, rulfrotingoj kaj sabloproviloj malaltiĝis tridek kvin ĝis kvindek procentojn. Ĉiuj ĉi tiuj plibonigoj progresigis la administradon de la fabriko.

La disvolviĝo de la fabriko dankas ankaŭ al tio ke la fabriko plenumis la politikon de la Popola Registaro, “Bono al ambaŭ la laboristoj kaj la kapitalistoj”, kiu plibonigis la rilatojn inter ili kaj la vivon de la laboristoj. Antaŭ la liberiĝo la kapitalistoj estis tre avaraj tiurilate al la laboristoj. Tiam la salajro de la laboristoj estis tre malalta, kaj sekve ili estis en malalta laborfervoro kaj tio malebligis la teknikan progreson. Post la liberiĝo la produktado kaj la negoco akiris plialtigon kaj la kapitalistoj ŝanĝis sian sintenon en disponado de rilato inter laboristoj kaj kapitalistoj. La vivo de la laboristoj ricevis partajn plibonigojn. Nun la salajro de la laboristoj estis denove fiksitaj tiel ke ĉiu ricevas meznombro la sumon egalan al la kosto de 300 kilogramoj aŭ pli da rizo ĉiumonate. Por pli da teknika progreso oni starigis premian sistemon. Oni promesas ke tiu, kiu produktas certan kvanton da produktaĵo en pli mallonga tempo, ricevas la salajron originale fiksitajn laŭ normala bezonata tempo. Danĝerantaŭforigado kaj ventumado estis ankaŭ pliperfektigitaj. Manĝhalo, banejo kaj loĝejo estis aranĝitaj aŭ konstruitaj post la movado de “kvin kontraŭ”. Ĉio ĉi tio multe akcelis la plialtigon de produktado. Ekzemple, en la daŭro de ok monatoj—ekde septembro 1951 ĝis aprilo 1952—la laboristoj prezentis nur dek ses raciigajn proponojn. Dum la kvar monatoj post la movado de “kvin kontraŭ” la laboristoj prezentis entute dudek kvin tiajn proponojn. Juna laboristo Feng Jiesien, kiu antaŭe estis nur balaisto en la fabriko, post


(daŭrigo sur p. 6)



Sceno el la opero *Vang Kuej kaj Li Ŝiang-ŝiang* produktita de la Popola Arta Teatro de Pekino. La libreto de la opero estas verkita de Li Po-ĉaŭ. Li Ŝiang-ŝiang estas savita de sia ĝustatempe veninta amato Vang Kuej kaj liaj gerilan-kamaradoj.

Scenoj el Pekinaj Teatroj

Simio Sun U-kung Malordigis la Paradizon — peco de klasika Pekina opero, populara teatraĵo verkita laŭ ĉapitro de romano de Ming-dinastio, ludita de la Ĉina Dramstuda Instituto. Li Saŭ-ĉun (sidanta), laŭreato de la Tutlanda Teatra Festo, eminente ludis la rolon de Simio Sun U-kung.





Liu Kiaŭ-er (La Lerta Knabino Liu), peco de Pingkju, ludita de la Pekina Eksperimenta Pingkju-trupo, estas rakonto pri moderna geedziĝo. Ŝin Feng-ŝia, laŭreato de la Tutlanda Teatra Festo. (maldekstre) ludis la titol-rolon.

Pekinaj Kalk

La klasikaj kaj modernaj verkoj de la okcidentaj vizitantaj lokaj teatraj trupoj.




La Kaptiĝo en la vivo de Romano de Li



Gaja danco prezentita de la vizitanta Kanton-danca Trupo de Rumana Armeo

Arbhakisto Liu kaj la Vivo de Hunan-provincio

La fino de *La Revizoro*, fama komedio de Gogol, ludita de la Junula Dram-akademio




Kalejdoskopaj Scenejoj

aj kaj modernaj teatraĵoj, majstraj dram-
la alidolentaj landoj kaj teatraĵoj ludataj
taj lokaj dramludaj trupoj faras la Pekinan
teatra vivon riĉa kaj multkolora.



Kapitolo kaj *Liberiĝo de Caŭ Caŭ*, epizodo
la vivo de unu el la ĉefministroj en la
dramo de la *Tri Regno* dramigita laŭ la stilo
de *Sensi*-opero.

Ĝita kaj la *Zulpo-feino*, peco de *Flortambura Danc-opero*
adaptita, ludita de trupo el Centra-suda Ĉinio.



Laŭreatoj de la Teatra
Festo Fang Juej-ĉuan
kaj Fu Ĉuan-ŝiang
ludis la ĉefrolojn en la
teatraĵo *Liang Ŝan-po*
kaj *Ĉu Jing-taj*, peco
de Ŝaŭsing-opero dra-
migita laŭ antikva
romano kaj ludita de
la Eksperimenta Ŝaŭ-
sing-opera Trupo de
Orienta Ĉinio.



Galina Ulanova, fama Sovetia baletistino, kaj ŝia
kundancanto, U. G. Kondratov, sur Pekina scenejo

Sceno el *Ne Ĉikado*, verkita de fervoja vagonriparisto
Vej Lien-zeng, ludita ĉe la teatro Junula Palaco.





Vidaĵo de Kuanting-kanjono—la riverbarilo kiu formas la grandan akvokonservejon estos konstruita ĉe tiu ĉi mallarĝa buŝo.

Konstruado de Kuanting-a Akvokonservejo

La konstruado de la plej granda artefarita lago de Ĉinio sude de la Granda Muro estis komencita en 1951. Kompletigite en la aŭtuno de 1953 ĝi kovros 220 kvadratajn kilometrojn, finos inundojn laŭlonge de Jungting-rivero kaj entenos akvon por irigacio, navigado kaj produkto de elektro.



Vojkonstrua maŝino kaj kamparanoj kunlaboras en konstruado.

Celebro pri la kompletigo de la disfluiga tunelo



La enirejo de la 495 metrojn longa disfluiga tunelo



La Nova Dommastrino

Gladys Taylor Yang*

Multaj estas la ŝanĝoj ĉi tie en Nankino de post liberiĝo. Kelkaj estas rapidaj kaj spektaklaj, kiel ekzemple, la nova puremeco rezultiĝanta el la tutlanda higiena movado. Aliaj okazas iompostiome, tamen ili havas grandan signifon, ĉar ili elmontras la vojon de estonta disvolvado. La ŝanĝo en la vivo de ĉinaj urbaj dommastrinoj estas tia.

Vivo Pasinta kaj Vivo Nuna

Dum la jardeko antaŭ la liberiĝo, la vivnivelo de la mezklasaj dommastrinoj ĉiujare malaltiĝis. En la hejmo, ŝi povis malmulte helpi al si kaj kindergartenoj kaj infanzorgejoj tute ne ekzistis. Okupoj estis malmultaj. Virinoj estis nedezirataj en multaj profesioj. Loĝejoj estis nesufiĉaj kaj alta lupago iris manenmane kun hompremaj loĝ-kondiĉoj.

Ĉiutaga vivo por la dommastrino estis perdiĝanta batalo kontraŭ la furioza inflacio de Ĉiang Kaj-ŝek. La pagtago de ŝia edzo estis tempo rapidi al la nigra merkato kaj interŝanĝi malsufiĉan salajron por Usonaj aŭ argentaj dolaroj en vana klopodo sin gardi kontraŭ la konstanta malplivaloriĝo de la Kuomintanga mono. Ŝi estis doma sklavo kiu zorgas nur pri sia batalo por ekzistado.

Ĝrara reformo kaj la nova geedziĝa leĝo jam revoluciigis la situacion de dekoj da milionoj da kamparanoj, kiuj nun posedas teron en sia propra nomo. Virinoj en industrio nun ĝuas egalajn rajtojn kaj ŝancojn kun viroj kaj laborantaj patrinoj povas sendi siajn infanojn al vartejoj. Sed kia estas la situacio de la antaŭa mezklasa dommastrino, kiu ne havas specialajn kvalifikojn?

La respondo estas ke ŝi ankaŭ havas ŝancojn por multe pli riĉa vivo ol antaŭe. Unue ŝi havas nun ekonomian stabilecon. Inflacio estas jam delonge haltigita kaj la efektiva salajro pli altiĝis; laŭplana dommastrumado estas ebla.

La kreskanta nombro de vartejoj kaj trejnaj kursoj ebligis multe da dommastrinoj preni tutatagajn aŭ partatempajn laborojn. Kelkaj, post mallongperioda trejnado, helpis plenumi la grandan bezonon por pli da instruistoj de elementa lernejo aŭ kleriga kurso.

Ĉiu dommastrino nun estas tiritita en sociajn agadojn. Ĉiu strato aŭ malgranda distrikto havas sian Loĝanto-Komitato-n, kiu organizas komunan lernadon riate al landskalaj aŭ urbskalaj movadoj kaj gvidas ahajn grupajn agadojn. Tiele, la unuan fojon en siaj vivoj multaj virinoj trovis ag-kampon por sia administra kapablo. En nia najbaraĵo, ekzemple, kelkaj dommastrinoj kolektive havis stebilojn por fari vestojn alternante dum tri horoj posttagmeze, tri aŭ kvar fojojn ĉiusemajne.

Nun la dommastrino havas pli riĉan kulturen vivon ol iam ajn antaŭe. En multaj distriktoj oni organizas ankaŭ kantodanco-kursojn, aŭ prezentas trajtajn kaj dokumentajn filmojn. Tiuj neniam antaŭe vizitis lernejon, nun povas ĉeesti klerigajn klasojn, Grupo da dommastrinoj en nia distrikto aliĝis al tia kurso dum la somero por

studi la novan rajidan sistemon por ellernado de 2000 ĉinaj ideografoj kaj ilia entuziasmo estis infekta. Ĉar la vetero estis varma kaj fenestroj estis malfermitaj, oni povis ilin aŭdi kant-legantaj la fonetikajn signojn en akompano de ridado kaj babilado ĝis la deka horo en la nokto.

Kelkaj ekzemploj el miaj konatoj povas ilustrati la ŝanĝon en la ordinara dommastrino pli bone ol la ĝeneralaj traktaĵoj supre donitaj.

S-ino Lien

En 1948 mi havis najbaron s-ino Lien, kiu estis la edzino de iu registara laboranto kaj havis du infanojn. Kiam mi ekkonis ŝin, ŝi estis ligita al la domo, nur interesita pri la demando, kiel elspezi ne pli ol la enspezo. Ĉio, kion ŝi parolis, estis pri varprezoj kaj klaĉoj pri la najbaroj. Pri ia ajn demando grava ŝi simple papage ripetis kion ŝia edzo parolis.

Post liberiĝo s-ro Lien iris al Pekino por unu jaro kaj lia edzino komencis lerni kaj legi. Ŝia filo, Juna Pioniro, kuraĝigis ŝin. Ŝi ekvolis fari sian parton en nacia reconstruo kaj serĉis produktan laboron. En la komenco, ŝi ne trovis ŝancon, ĉar la ĵus liberigita Nankino devis lukti kun la de Kuomintang postlasita senlabora problemo. Tial ŝi aĉetis al si maŝinon kaj faris ŝtrumpojn. Kiam ŝi vidis, ke la merkato estas saturita de tiu ĉi produktaĵo, ŝi lernis maŝinskribon kaj kontadon en Junula Kristana Asocio (YMCA), kaj aliĝis al iu politika studrondo.

Kiam ŝi komencis adresi siajn leterojn al sia edzo en Pekino per "Kamarado Lien," kaj li skribis responde "Kamaradino Ĉen" (fraŭlina nomo de s-ino Lien), la tuta najbaraĵo ege amuziĝis. Sed tio ĉi estis ja ilustrado de la reala ŝanĝo en iliaj interrilatoj. Antaŭe, s-ino Lien rigardis sian edzon kiel aŭtoritaton pri ĉiuj gravaj aferoj. Ĉe ŝi ĉiam estis "Li diris tion ĉi" kaj "Li pensis tion".

S-ro Lien trovis sian edzinon tute ŝanĝita kiam li revenis de Pekino. Fakte estis mirige por li, aŭdi tiun



La Pekina Produkta Kooperativo de Brodaĵoj havigas al siaj membroj belan kaj multenspezan profesion.

ĉi virineton kontraŭstari liajn opiniojn kiam li deklamis en sia malnova aŭtoritata maniero. Nun s-ino Lien laboras en iu banko kaj la infanoj bone lernas en kindergarteno kaj lernejo. La ĉefa efikeco de tiu ĉi ŝanĝo ne estas ke la familia enspezo multe pliiĝis, sed ke la geedziĝo fariĝis vera kunuleco kaj s-ino Lien gajnis en memrespekto kaj feliĉo.

Eksa S-ino Ĉaŭ

Alia ekzemplo estas eksa s-ino Ĉaŭ, granda alta kamparanino el la nordo, en la aĝo de la unuaj dudekelkaj. Antaŭ ses jaroj, aranĝitaj de aliuloj, ŝi edziniĝis kaj fariĝis la dua edzino de iu ekziginta Kuomintang generalo. Sen infano kaj havante tro malmulte por fari, ŝi fariĝis dom-fiera, maĝon-ludanta dommastrino.

Aliĝinte al iu studgrupo iom post liberigo, ŝi ekvidis sin io pli ol nur dommastrino. Ŝi estis civitano de nova Ĉinio kaj volis labori. Ŝi trovis okupon en alumeta fabriko. "La salajro estas nekonsiderinda," ŝi diris al mi, "sed tio estas trejnado kaj labori estas pli bone ol sidi hejme." Ŝi vizitis la klerigan klason kaj komencis frekventi la novajn filmojn. Estis rimarkinda kreskado de ŝia memfido kaj mensa vigleco.

La sekvinta paŝo estis akiri eksedziniĝo de la maljunulo al kiu ŝi estis devige edzinigita. Kiam ŝi lasttempe vizitis min, ŝi diris al mi, ke ŝi edziniĝos kun iama soldato de la Popola Liberiga Armeo, samaĝa kiel ŝi mem, kaj ke ŝi laboros en Nankina nova kotonŝpino. Kvamkam eble ŝi nun vivas ne tiel komforte kiel antaŭe, kiam ŝi estis edzino de Kuomintang generalo, tamen ĉiu, kiu konas ŝin, ne povas dubi, ke ŝia vivo estas pli riĉenhava ol antaŭe, kaj ŝi estas fiera pri tio, ke ŝi estas produktiva membro de la socio kaj ne parazito.

Mia Bopatrino

Ekzemplo de la maljuna generacio estas mia propra bopatrino, vindit-pieda, tradicia patriarkino de la malnova Ĉinio, kies antaŭa sola zorgo estas La Familio. Mi jam ne vidis ŝin por kelkaj jaroj, sed ŝiaj leteroj montras la ŝanĝon en ŝia perspektivo, de dubo kaj timemo al aprobo kaj subteno al la popola registaro.

Mia bopatrino kutimis malestimi homojn, kiuj laboras per siaj manoj. Imagu nian surprizon, kiam, dum la Tienzin-a Ekspozicio en 1950, ŝi helpis gastigi la vizitantajn kamparanojn el la najbaraj vilaĝoj. Ŝi skribis pri sia zorgo pri la nepoj kiel unu formo de servo al la popolo, ĉar tio permesis al ŝia filino labori tut-kore. Ŝi, kiu neniam legis ion ajn antaŭe, nun atente ĉiutage legas la ĵurnalojn, kaj ŝi ja gratulis mian edzon kiam li havis ŝancon iri por lerni en Pekino.

Ŝi ofte skribas al ni instigante nin bone labori. En lasta monato, ni ricevis okpaĝan leteron, "Ju pli multe mi vidas, des pli multe mi estas impresita pri nia nova socio," skribis tiu ĉi virino kiu kreskis el la ĉirkaŭaĵo de vera feŭda ideologio. Ŝi citis ekzemplojn de korupto punita, de novaj publikaj laboroj en Tienzino, kaj priskribis kiel ŝia filino laboras en la kolegio, kie ŝi instruas, dum antaŭe ŝi estis malakceptita kiel 'virino'.

"Atentu ke vi serioze prenu mian tiun ĉi leteron," ŝi finis, "ĉar la skribado de ĉio ĉi tio prenis de mi du tagojn, kaj mi volas, ke vi sciu kiaj estas miaj opinioj. Kaj vi ne bezonas tuj respondi, ĉar mi scias kiel okupataj ambaŭ vi estas." Tio ĉi, flanke de dom-

mastrino, kiu kutimis rigardi la mondon per tio, ke "Familio venas la unua", ja estas mirigaĵo.

Multaj ja estas la rakontoj pri tia maljuna virino kia mia bopatrino, kiu estis tiele influita de la liberigo de Ĉinio, kaj kiu nun al ĝi donas ĉiujn siajn fortojn —sepdekjaruloj kolektis donacojn por la volontuloj en Koreio, kolektis pacsubskribojn kaj starigis rekordojn de muŝ- kaj moskito-kaptado en la higiena kampanjo.

Mi opinias, ke estas grave kaj necese priskribi kazojn de ordinaraj urbaj dommastrinoj prefere ol tiujn de elstaraj ekzemploj, kvamkam la laste nomitaj estas multaj. S-ino Ordinara Dommastrino ne plu estas kontenta nur resti en la kuirejo. Ŝi volas fari utilan laboron, pensi senpere per si mem, altigi sian kulturan nivelon kaj vivi pli kompletan vivon. Kaj laŭ la rapideco de ĉina industriigo tiu ĉi tendenco estos plie akcelita. Ŝi nun rigardas partoprenon en socia vivo kiel sian devon kaj de kio ŝi ricevas profundan kontenton. Certe ĉinaj dommastrinoj jam ŝanĝiĝis!

Trad. Z.

* *S-ino Gladys TAYLOR Yang naskiĝis en Pekino de britaj misiistaj gepatroj kaj nun instruas en Nankino.*

† *Maĝono estis populara vetludo de malnova Ĉinio por kvar ludantoj.*

Nova Spirito en Pekinaj Metiartaĵoj

(daŭrigo de p. 17)

beno por siaj negocoj kaj vojaĝoj.

La plej malnovaj pentraĵoj en tiuj kavernoj produktiĝis en 366 p.K. kaj kelkaj aldoniĝis al ili malfrue en la 18a jarcento. La plej bona parto el ili manifestis diversajn art-trajtojn ekde la primitiva senpereco en la frua periodo ĝis la riĉaj koloroj kaj komponoj en la Tang-dinastio (618-906 p.K.). Dum la ĉefaj temoj estas religiaj, la mur-pentraĵoj ankaŭ elmontris la popolanojn de ĉiu periodo kiuj terkulturis, batalis, ĉasis kaj sin amuzis. La kornicoj, frisoj, kolonoj kaj altaj plafonoj de ĉiu kaverno estas plenaj de geometriaj desegnoj kun mirinde ornama valoro.

La plejparto de la ĉina publiko ne havis antaŭe multan scion pri tiu ĉi arta trezorejo de sia propra lando. Kiam la lokaj metiistoj akompanate de la Pekina Metiartaĵa Kompanio iris vidi la ekspozicion, ili estis treege mirigataj pro la perfekteco de la geometriaj desegnoj kaj la brileco de la kromataj skemoj. Fojon post fojo ili vizitis la ekspozicion. Ili scivoleme ĉeestis lecion speciale aranĝitan por ili kaj petis la artistojn farintajn la reproduktajn provizi ilin per desegnoj. Tiuj desegnoj nun aperas sur teleroj, vazoj, lampoj, pudrujoj, teujoj kaj tapiŝoj. La sekretario de la Pekina Metiartaĵa Kompanio diras: "Niaj laboristoj estas kvazaŭ homoj kiuj multjare observis la saman, enuigan dieton kaj subite trovas novan bongustan manĝaĵon."

Por plialtigi la nivelon de metiartaĵoj en aliaj partoj de Ĉinio, la novaj Pekinaj produktoj estas senditaj al grandaj komercaj ekspozicioj okazantaj en multaj grandaj urboj. Ili ankaŭ estas elmontritaj eksterlande en Sovetunio, Svislando, Svedio, Pollando, Danlando kaj Norvegio. Ĉie ili estas admirataj pro la originaleco de la desegnoj kaj la supereco de la tekniko. Kunigante malnovan artleritecon kun vivecaj desegnoj, ili nature estos bone konataj tra la tuta mondo.

Trad. I. K.

* *Taoismo estas religio atribuita al Laŭze, antikva ĉina filozofo (ĉ. 500 a.K.).*

Nova Spirito en Pekinaj Metiartaĵoj

Ekscitaĵoj nun okazas en la mondfamaj Pekinaj meti-artaĵoj. Unuafoje en la daŭro de kelkcent jaroj, novaj desegnoj aperas en kloisoneoj kaj porcelanoj, jadaĵoj kaj eburaj skulptaĵoj, en tapiŝoj kaj brodaĵoj. Majstraj metiistoj faras energi-plenajn ebur-figurojn de nuntempaj ĉinaj viroj kaj virinoj anstataŭ budaismaj sanktuloj kaj taoismaj* ermitoj. Sur la kloisoneaj pletoj kaj pentritaj silkaj lanternoj aperas viglaj knaboj kaj knabinoj svingiĝantaj en la gaja jango-danco. Kolomboj de paco flugas sur pudrujoj kaj teleroj. Vazoj estas pentritaj laŭ diverskoloraj desegnoj adoptitaj el la prosperaj, sed ne la dekadencaj, periodoj de ĉina arto.

Ĉio ĉi-tio reprezentas revolucion evoluon en metiarta desegnado kiu restis stereotipa depost la 18a jarcento. Kiu ne vidis tiun eterne aperantan drakon sur fono de malgrandaj ringoj, tiujn arojn da tradicie desegnitaj floroj kaj tiujn homajn figurojn sur porcelanoj en tiaj kostumoj kaj humoroj apartenantaj al la antikva tempo? Sub la patronado de la lastaj manĉuaj imperiestroj tiuj desegnoj perdis ĉiun vivecon meze de ornamaj konfuzaj. Pli poste ili produktiĝis aŭtomate nur por plenumi la dezirojn de eksterlanduloj. La ĉinoj mem ne plu ŝatis la plejparton de tiuj objektoj. Kiam ili faris donacojn unu al la alia, ili preferis fruktojn, dolĉaĵojn aŭ alion.

Kiel Komenciĝis la Ŝanĝo

Nun, post la liberigo, la Pekina metia arto komencis revekiĝi el sia letargio. La popola registaro faris novan kuraĝigon al grupo da Cinhua-Universitataj profesoroj kiuj jam kelktempe sinokupis pri desegnado surbaze de antikvaj ĉinaj bronzaĵoj aŭ porcelanoj kaj proponis la desegnojn al progresemaj majstraj metiistoj fabrikantaj kloisoneajn artiklojn. En junio 1950, la registaro starigis la ŝtatposedatan Pekinan Meti-artajan Kompanion. Tie laboris tiuj profesoroj kaj grupo da artistoj produktante desegnojn mikasantajn la plej bonan, energian parton de antikva ĉina arto kun la atmosfero de nova Ĉinio.

Komence tiu-ĉi eksperimento renkontis multajn malfacilojn. Eksport-komercistoj rifuzis preni la novajn

babilis pri la afero. Paroladoj estis farataj pri la deveno kaj historio de la art-verkoj prezentitaj. Tagon post tago la artistoj iris kun siaj stabloj kaj farboj por kopii la bildojn. Tiu ĉi ekspozicio ankaŭ havis grandegan influon al meti-artaĵoj.

Tunhuang estas malgranda urbo ĉe la rando de Gobi-dezerto. Iam ĝi estis grava stadio sur la poŝtvojo interliganta Ĉinion kun Irano, Hindio, Grekio kaj Romo kaj tie troviĝas grandaj kulturaj monumentoj en la formo de 469 kavernoj ornamitaj per budaismaj religiaj pentraĵoj kaj freskoj kontribuitaj de piaj preterpasantoj kiuj preĝis pri

(daŭrigo sur p. 16)

produktojn asertante ke iliaj klientoj en Usono, Britlando kaj aliaj kapitalistaj landoj preferis nur tiujn desegnojn kiujn ili asociis kun Ĉinio, ekzemple: drakoj kaj delikataj, afektantaj virinoj. La metiistoj jam mehanike produktis tiajn malnovajn ornamajojn dum generacioj; ŝanĝi estis perdi tempon kaj krome ili ne konvinkiĝis ke sukceso ilin atendos.



Celante konkeri tiujn barojn, la kompanio aranĝis kunvenojn kaj invitis la metiistojn por diskuti pri la tradicio de ĉina arto kaj pri la kaŭzoj de ĝia degenero. La kompanio konsilis al ili reveni al la originalaj fontoj kaj ilin disvolvi en pli sana direkto. Grandaj sumoj da mono estis pruntitaj al la metiejoj kaj la kompanio mem mendis multnombre artiklojn kun novaj desegnoj. La kompanio konsentis rekompenci ilin pri ĉiuj perdoj rezultantaj el ŝanĝado kaj eksperimentado.

En la printempo de 1951, pro Usona embargo la komercistoj de metiaj art-produktaĵoj provis serĉi novajn merkatojn. Unue ili turnis sian atenton al la disvastigado de la enlanda merkato. La kompanio trovis ke por interesi la ĉinajn kilentojn pri la metiartaĵoj estas necese ke ili produktu artiklojn harmoniantajn kun la popola sentimento depost la liberigo. La sama principo aplikigas al la novaj internaciaj kontaktoj de Ĉinio. Ambaŭ la registaro kaj la popolaj organizoj sendis delegitarojn al amikaj landoj. Ili bezonis kunporti kun si donacojn kiuj konigos certgrade al la eksterlandaj popoloj novan spiriton en Ĉinio.

La Pekinaj metiistoj komencis skulpti statuetojn de novaj herooj kaj heroinoj kiuj fordonis sian vivon por sia patrio. Ili produktis fariĝis pli vivecaj kaj ilia entuziasmo leviĝis pli alten. La artistoj estis multe okupataj pro tio ke la metiistoj postulis de ili ĉiam pli kaj pli da desegnoj.

Inspiro de Tung-huang

Pli poste, kiam alvenis la printempo de 1951, nova stimulo ekprezentiĝis. Pli ol mil pentritaj reproduktoj de la antikvaj mur-pentraĵoj de Tunhuang-kavernoj en Kansu-provinco estis elmontritaj unuafoje en Pekino. La ekspozicio kaŭzis grandan sensacion. Ĉiu homo



Kantas Ni la Karan Patrion

Moderato Grandioso

Kanto kaj muziko de Vang Sin
Esperantigis Laŭlum kaj Honfan

The musical score is written in 2/4 time with a key signature of one flat (B-flat). It consists of a vocal line and a piano accompaniment. The piano part features a prominent bass line with eighth-note patterns and chords. The vocal line includes lyrics in Esperanto. Dynamics include *mf*, *mp*, and *ff*. The score concludes with a *Fine* marking and a *rit.* (ritardando) section.

mf Flirtas ru- ĝa

flag' kvin- ste- la. Kanto ven- ka tondras en l'a- er'.

mp Kantas ni la ka- ran pa- tri- on, *mf* Ki- u mar- ŝas de

nun al pros- per'. Kantas ni la ka- ran pa- tri- on, Ki- u

mar- ŝas de nun al pros- per'. nun al pros- per'. *Fine*

ff *Fine*

Tra la mont-ĉen', tra la e-ben', Flu-as Jang-ze kaj
 Kun la-bor-em' kaj ku-raĝ' ni Ce-las al sen-de-
 En o-ri-ent' sun' en as-cend', Kre-skas la Res-pub-

Flava Ri-ver'. Vas-ta su-per-ba lan-do vi,
 pend' kaj li-ber'. Nur post la venk' de ĉi-a bar'
 li-ko kun bril'. Ni-a gvi-dan-to Maŭ Ze-tung

Ho ni-a pa-tri-o, ka-ra ter'. He-ro-a la po-pol' sta-
 Ni sa-vis nin el la sklav-su-fer'. A-ma-ta la pac' kaj
 Sa-ĝe nin di-rek-tas al la cel'. Bo-ni-ĝas ĉi-am pli jam

ri-ĝaskun fort' U-nu-iĝ-as ni ki-el ŝta-li-ĝin-ta fer'. Flirtas
 sa-mela pa-tri; Ki-u tu-ŝus nin, ni lin sen-dus al in-fer'.
 ni-a viv-ad'. Ni-a es-ton-tec' es-tas la sen-li-ma hel'.

Forstiga Plano por 1953

En la jaro 1953 nova Ĉinio forstigos 1,497,810 hektarojn da tero. Tio ĉi estas dek du kaj duona obloj de la forstigita areo en 1950 kaj 80% pli multe ol en 1952. La ĉefa tasko en 1953 estos planti novajn forstojn kaj ekspluati tiujn ankoraŭ ne tuŝitajn. Kaj oni daŭrigos la esploradon pri lignorezervoj kaj grundo taŭga por forstigado, reforstigon de malnovaj kaj detruitaj forstregionoj, kaj konstruadon de kontraŭventaj forstzonoj en Nordorienta kaj Nordokcidenta Ĉinio kaj aliaj regionoj. Granda forto estos dediĉita por forstigi la flubasenojn de la branĉoj de la Flava Rivero. Kaj same energie oni laborados en forstigado de la supra kaj meza valoj de la Huajrivero kaj de la Jungting-rivero en Norda Ĉinio.

En la pasintaj tri jaroj, 1,350,000 hektaroj da tero, ĉirkaŭ triono de la grandeco de Svisio, jam estas forstigitaj. La bonaj efikoj de konservado de akvo kaj tero estas jam senteblaj, kaj la malbena de naturaj plagoj reduktiĝis.

Novaj Fervojoj kaj Aŭtovojoj

Rekonstruo de la 144-kilometra Jeŝoŝou-Ĉefeng-a branĉlinio de la Ĉinĉou-Ĉengte-a Fervojo en Nordorienta Ĉinio estis kompletigita la 16-an de lasta novembro, 17 tagojn antaŭdate. Tio ĉi faciligos la komercon de kuracherboj, ledoj, feloj kaj aliaj lokaj produktaĵoj.

Restarigo de la 102-kilometra Ĉinŝien-Ĉengzetung-a branĉo de la Ĉina Ĉangĉun-a Fervojo en la regiono de Port-Arturo kaj Dajreno estis kompletigita 9 tagojn antaŭdate kaj formale malfermiĝis por trafiko je la 22-a de novembro, 1952. La bordera regiono laŭlonge de la fervojo estas fama pro siaj salo-industrio produktanta kvaronon de la tuta produktokvanto de la Nordoriento kaj riĉaj fiŝproduktaĵoj.

Je la 20-a de novembro, 1952, la Kangting-Ĉangtu-a Aŭtovojo estis malfermita por trafiko 50 tagojn antaŭdate. La vojo estas la unua sekcio kaj ĉirkaŭ la duono de la Sikang-Tibeta Aŭtovojo komenciĝanta de Kangting, la ĉefurbo de Sikang-provinco, kaj finiĝanta ĉe Lhasa, la ĉefurbo de Tibeto. Kun la malfermiĝo de la Ĉengtu-Ĉungking-a Fervojo kaj la kompletigo de la Tienŝuej-Ĉengtu-a Fervojo en la proksima estonteco, la aŭtovojo rapidigos la interflumon de varoj inter Lhasa, Ŝanhajo kaj Norda Ĉinio.

Nova aŭtovojo interliganta Labrang-on, antikva komerca centro de Kansu-provinco, kun Linŝia, kiu troviĝas 100 kilometrojn malproksime, malfermiĝis je la 15-a de lasta novembro. Interligite kun la Linŝia-Lanĉou-a Aŭtovojo, ĝi kreas novajn eblecojn en komercado inter Labrang kaj la aliaj partoj de la lando, ĉar Lanĉou estas ĉe la fino de la Lung-haj-Fervojo kiu ebligas var-interflumon inter Lanĉou kaj la ceteraj partoj de Ĉinio.

Ripozhejmo por Laboristoj de Orienta Ĉinio

Alia bela ripozhejmo por laboristoj en Orienta Ĉinio malfermiĝis antaŭ nelonge ĉe Tajhu-lago en Kiangsu-provinco. Tiu ĉi ripozhejmo estas fondita de la Orient-



ĉinia Oficejo de la Tutĉinia Federacio de Laboristoj.

La ripozhejmo, kiu situas sur la monto Ĉungtu kaj frontas al la nordokcidenta parto de la bela lago Tajhu, kovras 3,000 kvadratajn metrojn. Inter la oportunaĵoj en la ĉarma ejo sin trovas sunbanejo, duŝĉambroj, legoĉambro kaj refreŝigejo. Ĝi povas enloĝigi 150 personojn samtempe. Antaŭe, la lago Tajhu estis tre ŝatata vizitindejo por riĉaj bienuloj kaj Kuomintang-aj oficistoj.

61 modelaj laboristoj el ĉefaj industriaj centroj kaj minejoj de Orienta Ĉinio estas la unua grupo kiu tie ĝuas sian libertempon.

Normigitaj Planoj por la Konstruado en Nordorienta Ĉinio

Grandskala konstruado de oficejoj, lernejoj, hoteloj kaj aliaj konstruaĵoj estas komencita en Nordorienta Ĉinio. Tio ĉi fariĝas ebla dank' al apliko de normigitaj planoj.

La Civila Plan-Kompanio de la Nordorienta Industria Departemento faris 14 kategoriojn de planoj por diversaj konstruaĵoj tiel ke la nor-

mitaj planoj taŭgu en diversaj kazoj.

Tiuj ĉi normigitaj planoj baziĝantaj sur la Sovetiaj normigitaj planoj plirapidigos konstruadon per antaŭfarado de diversaj instalaĵoj kiel fenestrokadroj, pordokadroj, plumbotuboj, lignaĵoj k.t.p.. Tio ĉi ankaŭ malaltigos la konstruajn kostojn, mallongigos la konstruan tempon kaj altigos la kvaliton de la konstrua laboro.

Pli da Teknikaj Lernejoj en Tienzin

Teknika edukado multe disvolviĝis en Tienzin por respondi la urĝan bezonon de la landa konstruado. Nun en tiu urbo jam troviĝas 14 teknikaj lernejoj kun pli ol 6,000 studentoj.

Krom fondiĝo de novaj lernejoj, la antaŭe jam funkciaj teknikaj lernejoj estas reorganizitaj por ke ili bone adaptiĝu al la nunaj postuloj. Inter la instruataj objektoj estas civila inĝenierado, teksinĝenierado kaj teknikoj pri fervojo, ole-industrio, akvokonservado, sanitaro, financo k.t.p. Helpe de Sovetiaj kaj ĉinaj spertuloj en instruado de tekniko, novaj instruaj metodoj estas aplikitaj.

Grandaj sumoj da mono estas asignitaj de la Tienzin-aj edukaj aŭtoritatoj por konstrui novajn lernejajn konstruaĵojn kaj aĉeti ekipaĵojn. 27,000,000,000 juan-oj estis asignitaj al unu institucio, la Tienzin-a Teks-Lernejo, sola.

Nordorienta Industrio Produktas Novajn Specojn de Ekipaĵoj

Ŝtataj fabrikoj de Nordorienta Ĉinio jam elfaris centojn da specoj de novaj modernaj industriaj ekipaĵoj en la pasintaj tri jaroj dank' al la helpoj de Sovetiaj spertuloj.

En la kampo de maŝinfarado sola, pli ol 400 novaj specoj da produktataj estas produktataj. Inter ili estas tornmaŝinoj, 106-milimetraj precizaj bormaŝinoj, magnetaj selekto-maŝinoj, 9-metraj rabotmaŝinoj, 5-tunaj vapor-marteloj kaj aliaj maŝinoj. Per iuj el ĉi tiuj maŝinoj oni ne nur provizas la fabrikojn en la Nordoriento, sed ankaŭ tiujn sude de la Granda Muro. Kaj la sukcesa produktado de silicia karbonido estas ja gravega por la disvolvo de industrio tra la tuta lando.

Krom tiuj supre diritaj maŝinoj, aliaj centoj da novaj specoj de elektraj ekipaĵoj kiel generatoroj, elektraj motoroj, transformatoroj k.t.p. estas fabrikataj.

La Ruĝflaga Teamo

Liu Ŝu-tang

La suno vomis fajron el la sennuba ĉielo kaj cikadoj kantis laŭte; estis tiel varmege, kiel en la motorejo de vaporŝipo. Du helruĝaj flagoj staris apud rizkampo ĉe la digo. Kelkaj junaj kamparanoj sarkis fervore en la kampo, kantante dum laborado. Ŝvito fluis mal-supren laŭ iliaj brilantaj bronzkoloraj dorsoj.

Li Taĉun, la ĉefo de la grupo, rektigis sin kaj kriis: "Ni havu iom da ripozo, kiam ni finos tiun ĉi kampon." Erĉu protestis sen interrompiĝo de laboro: "Kiel vi opinias, se ni finos alian kampon antaŭ ol ripozi?" Sed Li Taĉun diris, ke ili tro laciĝos se ili ne havas ripozon antaŭe. Tial ĉiuj kuŝiĝis sur la herbaron sub du grandaj salikoj, kiam ili atingis la limon de la kampo. Iuj el ili ekbruligis siajn longajn pipojn.

"Jen!" Erĉu kriis subite, "La edzino de Taĉun alportas al ni la manĝaĵon!" Kurante por ŝin renkonti, li alkriis: "Ajja! Vi estas vera heroino, ne ĉesante kuradi tien reen kiam la tempo de akuŝo estas tiel proksima."

Ĉinĉua turnis sin al Taĉun ridetaĉante: "Vi certe respondis al la alvoko por pliprodukto!"

Matung intermetis: "Nu, ili geedziĝis el libera volo, tial la afero iras tiel glate."¹ La aliaj ridegis.

Ĉjuhua, la edzino de Taĉun, paŝis en la arbombron kun korboj ŝarĝitaj de manĝaĵo. Erĉu komencis elkuleri la rizkaĉon kaj Ĉinĉua kliniĝis respekte al Ĉjuhua, dirante: "Ni kore dankas vin ĉar vi portas al ni la manĝaĵon, kiam via akuŝa tempo estas tiel proksima!"

"Tio estas nemenciinda," respondis Ĉjuhua.

Dum la viroj estis manĝantaj, ŝi ekmemoris pri io. "En tiu ĉi aŭtuno nia virina teamo malfermos konkurson kontraŭ vi."

"Bona ideo, bofratino Li!"² intermetis Erĉu. "Vi gvidos la virinan teamon kaj Taĉun la viran!"

"Taĉun," iu vokis. "Kiel progresas nun la laboro de la teamo de Lijun sur la Sabla Monteto?"

Taĉun pensis dum momento kaj respondis: "Nur kvar aŭ kvin muojn malantaŭ ni."

Matung ekstarigis kaj kriis: "Ajja! Manĝu rapide: havu dormeton kaj rekomencu labori!" La resto de la manĝaĵo malaperis dum palpebrumo. Ĉjuhua kolektis la manĝilaron kaj iris hejmen.

Ĉiuj escepte Matung kuŝiĝis por dormeti, nur li ne povis dormi. Li kuŝis malkviete dum momento, tiam kaptis terhakilon kaj rekomencis labori, vekante la kamaradojn kiam la suno apenaŭ atingis la zeniton. Ĉiuj laboris tiel rapide kiel eble, sed Taĉun admonis: "Ni ne tiel rapidu, ke la laboro estus malzorge farita! Ni devas elsarki ĉiun herbaĉon." La aliaj respondis unuvoĉe: "Ne maltrankviliĝu, la ĉampiona flago restos sekure en niaj manoj!"

Post la sunsubiro, ili hejmeniris kantante; Taĉun portis unu ruĝflagon ĉe la antaŭo, kaj la alian flagon portis Erĉu sekvante ĉe la posto. Kiam ili atingis la pordon de Taĉun, Ĉjuhua alkriis, "Kial tiel malfrue? Nun ĉio malvarmiĝis!" kaj Matung gaje kriis, "Neniom gravas, ni do ne brogos al ni la buŝojn!"

Nur 24-jara junulo, Li Taĉun estis partiano jam kvin jarojn. Erĉu kaj Matung ankaŭ estis partianoj. En la printempo, kiam la registaro alvokis la kamparanojn planti kotonon, la teamo de Taĉun respondis per plej multe da plantado kaj la distrikta registaro donis al ĝi ruĝan flagon kiel premion. Poste, kiam afisoj minacis la plantaĵojn, la superstiĉaj kamparanoj brulis incenson kaj koŭtoŭis³ al Budao kun preĝado, sed la teamo de Taĉun sekvis la konsilon de la registaro, aĉetis ŝprucigilon el la urbo kaj tiel forigis la peston. Ili donis bonan ekzemplon al la tuta distrikto, kaj tial estis premiita per la dua ruĝa flago.

En tiu monato la interhelpaj grupoj de la tuta vilaĝo malfermis konkurson por plena elsarkado de la herbaĉoj. La teamo, formita de ok familioj, havis ĉirkaŭ 150 muojn, kaj aldone al tio, aliajn 40 muojn por la familioj de martiroj kaj armeanoj. Nun restis al ili nur naŭ tagoj ĝis la datlimo de la sark-kurso. Dum dudek tagoj la teamo de Taĉun ĉiam havis la antaŭecon, tiu de Lijun ĉe la Sabla Monteto okupis la duan lokon.

* * *

Ĉu Sankuej, la mallaboremulo de la vilaĝo, zorgis simple pri manĝo kaj malŝatis laboron. La herbaĉoj en lia kampo kreskis pli altaj ol la plantaĵoj. Taĉun volis aligi lin al sia teamo por helpi lin forigi la malbonan kutimon kaj fariĝi honesta terkulturisto. Iun tagon Taĉun diris al la kamaradoj: "Mi proponas preni Ĉu Sankuej-n en nian teamon kaj ni provu fari el li progresulon..."

"Ne!" mankuante, Ĉinĉua interrompis lin abrupte per protesto. "Ni ne povas akcepti tian ĉevalfekajon. Atentu bone, ke nur kulero da polvo malpurigos tutan poton da supo." Tiun opinion apogis kelkaj aliaj, Erĉu kaj Matung estis partianoj kaj ne kontraŭdiris malferme, sed ili ne sentis malpli da naŭzo pri Ĉu Sankuej. Taĉun diris simple; "Nu, bone, ni parolos pri tio tagmeze."

Dum la manĝado, Taĉun tuŝis la aferon refoje: "Se ni ne prenis lin, neniun teamo lin akceptos kaj li eĉ pli malboniĝos. Mi povas certigi, ke li fariĝos ŝtelisto se li ricevos nenion el la rikolto. La PLA kaj la Partio verŝis sangon kaj ŝviton por ni, ĉu ni ne hontas se Ĉu Sankuej fordiboĉus sian monon kaj forvendus sian teron?" Ĉiuj manĝis sen respondo.

Fine Erĉu kaj Matung donis sian konsenton. "Ni estis tro egoistaj," ili konfesis, "kaj ne agis kiel partianoj." La aliaj ankaŭ akceptis la proponon de Taĉun finfine.

Poste, Taĉun iris serĉi Ĉu Sankuej'n. "La herbaĉoj en via kampo similas al arbetoj," diris li. "Kiel vi opinias pri aliĝo al nia teamo?"

"Bone!" Ĉu tuj konsentis. "Sed...mi ne povos provizi ĝin per manĝaĵo kiam la teamo laboras en mia kampo; vi bone scias, ke mi havas nenion ĉe mi. Cetere mi ne povos labori kune kun vi morgaŭ, ĉar mi jam faris promeson al mia bopatro."

Taĉun retenis sian koleron. "Ne zorgu pri la manĝaĵo, sed vi devas komenci laboron morgaŭ. Alie neniun

akceptos vin." Post multe da argumentoj, li fine sukcesis persvadi Ĉu'n komenci labori la sekvintan tagon.

Matene de la sekvinta tago Ĉu aperis kun malgranda rusta fosilo. Li iris malrapide dum laborado, zumante fragmentojn el Pekina opero. Ĉinĉua ĉiam pli malbonhumorigis kaj fine piedfrapante la teron li kriis: "Ĉu Sankuej, vi diablido, nun ni laboras en via propra kampo, sed vi agas tiel malstreĉe. Kion vi faros, kiam ni sarkos alies kampon?"

Ĉu ŝajnis ne aŭdi kaj Taĉun intermetis: "La herbaĉoj kreskas tiel dense, ke via malgranda fosilo malmulte taŭgas. Mi havigos al vi ion pli bonan." Li iris hejmen kaj alportis la terhakilon de sia edzino kaj pruntis ĝin al Ĉu.

Ĉiuj laboris fervore, konkurante inter si, sed neniu povis konkuri kun Taĉun. Ni diras 'ĉiuj' kompreneble dekalkulinte Ĉu, kiu postrestis malvigle for de ili. Ĉinĉua fiksis sian rigardon sur li kaj pretis eksplodi de kolero. Li ne plu povis sin reteni, ĵetiĝis sur Ĉu'n kaj donis al li survangon. "Vi mallaborema bastardo!" kriis li. "Vi devas senti honton! Taĉun laboras dekoble pli multe ol vi, kaj vi eĉ restigas duonon da herbaĉo en la kampo. Nia teamo ne bezonas vin!" Ĉu, furiozigit, levis la fosilon kaj minacis, ke li mortigos lin.

Taĉun alkuris kaj disigis ilin. Pala pro kolero, Ĉinĉua kriis: "Frato Taĉun, vi laboras dekoble pli multe ol li kaj ricevas dek poentojn, dum li ricevas kvin sarkinte nur duonan parcelon. Tio estas ne justa. Mi ne laboros kune kun li." Ĉu forĵetis la fosilon kaj forrapidis; Ĉinĉua ekkuris post li, sed Taĉun kaptis lian brakon. "Trankviliĝu!" li diris. "La sola rimedo estas lin reformi iom post iom." La aliaj grumblis inter si kaj daŭrigis la laboron denove, sed ne tre fervore.

Post momento, Taĉun turnis sin al Matung kaj Erĉu: "Vi du partianoj devas labori fervore kiel modeloj, tiam la aliaj sekvos. Estas por via propra profito elsarki la herbaĉojn en la kampo de Ĉu Sankuej; alie, kiel ni povus repagi por la malfacilaĵoj kiujn la Partio trapasis por ni? Erĉu, memoru ke via frato estis mortpafita de la armitaj dungitoj de la bienulo, kiam li provis reguligi la kontojn kun la lasta... Tiu ĉi tero venis al ni nur dank' al la sango verĉita de via frato kaj aliaj..." Erĉu kaj Matung, kun kapo klinita, rekonis la veron kiun li diris.

Vespere, Taĉun iris viziti Ĉu'n. La ĉambro aspektis kiel porkstalo. Ĉu kuŝis sur la terlito vizaĝe al la muro. Taĉun demandis, ĉu li estas malsana, sed li respondis malgaje, ke li havis kverelon kun sia "maljuna virino"⁴. Taĉun komprenis kio estas la afero. "Mi supozas, ke vi havas nenion por vespermanĝo," li diris milde. "Venu kaj manĝu kun ni." Ĉu, embarasite, sekvis lin.

Tiun nokton, Taĉun dividis kun li la saman terliton kaj uzis ĉiujn argumentojn, kiujn li eltrovis siatempe por lin persvadi. "Frato Sankuej," li diris, "kiam vi estis en la urbo, vi malŝparis ĉion, kion vi enspezis, en la drinkejo kaj ĉe publikulinoj. Vi neniam pensis ke vi iam posedos teron. Nun vi ricevis vian terpecon, kiel povas vi esti tiel mallaborema? Vi estas simila al tiu, kiu resaniĝas de serioza malsano kaj tuj forgesas la doloron..."

"Ĉu vi memoras, kiel mortis via patro? Per fortostreĉa laboro li fine kapablis aĉeti du muojn da tero. Sed ĝi estis subakvigita, kiam Dua Tigro ŝanĝis la vojon de la rivero. Kiam via patro protestis, Dua

Tigro mortigis lin per piedfrapo... Ne forgesu, ke via patro mortis por la tero. Nun vi ricevis sufiĉe da tero, sed vi ne laboras. Kiel vi povas montri vin antaŭ la najbaroj?"

Ĉu silentis.

La sekvintan matenon, Sankuej montris sin kun iom da entuziasmo kaj sarkis pli ol unu muon antaŭ sunsubiro. Ĉinĉua diris ŝtele al Taĉun: "Fine estas ankoraŭ iom da espero por Sankuej!" Taĉun ridetis grimace kaj respondis: "Mi kredis, ke vi diris pri iom da polvo kiu malpurigos la supon." Iom embarasite Ĉinĉua respondis: "Mi estis tro egoista por vidi tion antaŭe."

Sed nun la teamo de Lijun havis la antaŭecon super ili je 4-5 muoj ĉiutage, tio frenezigis Ĉinĉua'n. "Ĉiu el ni devas fini unu muon plian ĉiutage," li anoncis. "Kiu ne faras tion, estas hundaĉo!" Kredante, ke tiuj vortoj aludas al li, Sankuej perdis kuraĝon, plendis pro kapdoloro kaj forlasis la kampon. Taĉun, timante ke tio influus la entuziasmon de la kamaradoj, provis ilin gajigi. "Ĉiu el ni provu fini unu muon pli ĉiutage, ni superu la teamon de Lijun," li diris. "Ne lasu la ekzemplon de Sankuej vin malkuraĝigi!" Tiel ili laboris kun freŝa forto.

Tagmeze, kiam Taĉun iris viziti Sankuej'n, li trovis, ke la ĉambro estas vakanta; li informiĝis, ke la bofrato de Sankuej venis por tiu lasta. Nokte li iris refoje kaj trovis Sankuej'n kuntiriganta kaj singultanta mizere sub la litkovrilo. Taĉun fortiris la litkovrilon kaj post persista demandado eksciis, ke la edzino de Sankuej insistis pri eksedziniĝo, kiu jam estis sankciita de la distrikta registaro.

"Ne malĝoju, frato Sankuej," Taĉun konsolis lin. "Vi ja scias, ke ŝi edziniĝis al vi ne libervole. Kvankam ŝi estis tre progresema kaj la prezidantino de la Virina Asocio, tamen ŝia patro edzinigis ŝin al vi por savi ŝin de la armitaj banditoj de la bienuloj dum ilia reveno... Kompreneble ŝi ne volas resti la edzino de mallaboremulo. De nun estas pli konsilinde, ke vi laboru pli fervore kaj elserĉu iun, kiu volos edziniĝi al vi; alie vi restos senedzinulo la tutan vivon."

Sankuej efektive laboris pli energie la sekvintan tagon kaj sarkis pli ol unu muon. La kamaradoj ĝojis por li kaj kuraĝigis lin kiel plej eble. "Sankuej," Ĉinĉua alparolis lin rekte, "antaŭe mi estis tro ĉikanema pri vi kaj vin multe ofendis. Mi petas vian pardonon!" Erĉu ĵetis siajn brakojn ĉirkaŭ lian kolon kaj kriis: "Sankuej, vi estas bravulo! Kiel la proverbo diras: sentaŭgulo pentinta valoras pli ol oro!"

Taĉun ridis gaje kaj premis la manon de Sankuej, kiu ankoraŭ ridis ĝoje.

Antaŭ la finiĝo de la konkurso Sankuej sarkis tri muojn kaj duonon dum du sinsekvaj tagoj kaj ricevis sep poentojn de la aliaj teamanoj. Delegitoj de la loka Kamparana Asocio inspektis la laboron de la diversaj teamoj, aljuĝis unuan premion al la teamo de Taĉun kaj la duan al tiu de Lijun.

Taĉun partoprenis en la distrikta kunveno aranĝita je la honoro de lia teamo. La distrikta direktoro manpremis gaje kun li. "K-do Taĉun," li diris, "vi estas vera labor-modelo kaj partiano. Ĉiuj terkulturistoj en la vilaĝo devas lerni de vi." Taĉun ridetis embarasite. Li sentis, ke tio estas la plej granda honoro, kiun li iam ricevis. Kaj li ankaŭ estis invitita fari paroladon.

La distrikta registaro premiis la teamon de Taĉun per ruĝa flago kaj tri novaj fosiloj. Pro lia sukcesa

klopodo reformi Sankuej'n oni donis al Taĉun flageton kun la vorto "Labor-modelo" kaj aliajn premiaĵojn.

Iom poste, la gubernia registaro kunvokis konferencon de la gelaborherooj por ke ili interŝanĝu siajn spertojn. Kiam Taĉun revenis de la konferenco al la vilaĝo, li portis surbruste arĝentan medalon de Labor-modelo kaj kunportis ankaŭ blankan tolon, sapon kaj viŝtukojn kiel premiaĵojn.

La vilaĝanoj kuris ĉirkaŭ lin kaj superŝutis lin per demandoj. Li rakontis al ili pri la traktoroj kaj aliaj maŝinoj, kiujn li vidis. Inter la aŭskultantoj Sankuej estis la plej entuziasmigita. "Mi laboros pli fervore," diris li, "tiam mi partoprenos en tiaj honoroj."

Kiam la teamo laboris en la kamparo, la tri ruĝaj flagoj ĉiam staris flirtante apud ili. Ili brile kontrastis kun la verda foliaro kaj de tempo al tempo la teamanoj jetis al ili fieran rigardon.

Tradukis S. J.

- 1) *La paroloj de Ĉinĉua kaj Matung ŝerce aludis al ŝia gravedeco.*
- 2) *Bofratino: ĝenerala salutnomo por edzinigita juna virino.*
- 3) *Adorkliniĝi tuŝante la teron per sia frunto.*
- 4) *Maljuna virino: populara dirmaniero por "edzino."*
- 5) *Kromnomo de certa bienulo.*

Antaŭen Marŝas la Virinoj de Ĉinio

(daŭrigo de p. 9)

prenoj de feliĉiga laboro por infanoj kaj higieno pri patrinoj kaj infanoj; en ŝtataj institucioj, ŝtataj industrioj, vilaĝaj interhelpaj grupoj, agrikulturaj kooperativoj, la organizado de infanvartejoj kaj entreprenoj por patrin-infanaj aferoj atingas la plej rapidan nombron kaj havas plej grandan disvolviĝon. Laŭ la statistikoj de 30 provincoj, 13 urboj, 2 sub-provinciaj regionoj, 1 nacio-aŭtonoma regiono, la infanvartaj organizoj (inkluzive de infan-nutrejoj, infanĝardenoj, infanvartejoj, infandomoj, vartstacioj, okupat-sezonaj infanprizorgejoj k.t.p.) sumiĝas je pli ol 65,500 kun infanoj nombriĝante pli ol 457,000. En fabrikoj, ŝtataj institucioj kaj vilaĝoj jam multe plimultiĝas kaj pli disvastiĝas infanvartejaj organizoj. En la tuta lando nun troviĝas pli ol 21,000 institutoj por sanprotekto de patrinoj kaj infanoj kaj trejnitaĵaj vartistoj, akuŝistoj kaj reedukitaj malnovtipaj akuŝistoj. La metodo de sendolora akuŝo de Sovetio estas sukcese praktikata en la urboj kaj paŝon post paŝo disvastiĝanta. Pro tiu ĉi laboro la morto-procento de infanoj iom post iom malgrandiĝas, la sano de patrinoj kaj infanoj pli boniĝas tagen post tago, kaj samtempe tio kuraĝigas la virinojn al pli alta produktentuziasmo.

La egalaj rajtoj kaj specialaj protektoj akiritaj de la virinoj de Ĉinio kaj la granda forto montrita de la virinoj sub la zorgo kaj eduko de la ŝtato dum la pasintaj tri jaroj estas pruvoj de la supereco de la sistemo de popola demokratio. Sed, pasis nur tri mallongaj jaroj depost la fondiĝo de nova Ĉinio, kaj la miljaraj restaĵoj de la feŭda ideologio estimi al viroj kaj malestimi al virinoj postlasitaj de malnova Ĉinio ne estas facile radikale forigitaj en mallonga periodo, kaj tiel, la politiko de egalo de virino kun viro ankoraŭ bezonas longtempan lukton, senĉese konkerante malfacilaĵojn, subigante malhelpon, por sia tuta efektiviĝo kaj realiĝo. Pro tio, ni devas propagandi vaste kaj enpenetre al la tuta popolamaso la politikon de egalo

de virino kun viro, kontraŭstarante kontraŭ la restanta feŭda ideologio estimi viron kaj malestimi virinon, por ke la latentaj povoj de virinoj pli multe kontribuu en la granda konstruado de la patrio. Ni virinoj devas aktive respondi al la alvokoj de la Ĉina Komunista Partio kaj la Popola Registaro kaj sub ilia gvidado pli kaj pli unuiĝas, organiziĝas, pretiĝas en scio kaj tekniko por partopreni en la komenconta granda konstruo ekonomia kaj kultura, aktive laboras por la konstruado de la patrio, kaj luktas por starigi bazon por industriigo de la nacio kaj la fina liberigo de virinoj. Ĉiurangaj organizoj de la Federacio de Demokrataj Virinoj devas pli intime rilatiĝi kun la virina amaso, pli bone servas al ili, prizorgi la laboron, vivon, malsanon kaj suferon de laborulaj virinoj, doni atenton al disvolviĝo de higiena laboro por patrinoj kaj infanoj, strebi por la efektiviĝo de la Geedziĝa Leĝo kaj subteni ilian justecan lukton. Por tio, estas necese pli bone utili la formon de konferenco de virino-reprezentantoj, eduki pli multe da aktivuloj sur la nuna bazo, por ke ili pli bone ludu sian rolon kiel interligilo, unuigante pli grandan amason da virinoj por pli aktive partopreni la konstruadon de nova Ĉinio.

Ni klare scias ke nur en pacaj cirkonstancoj ni povos senmalhelpo fari la antaŭmenciitajn laborojn kaj ĝoje vivi egalan kaj feliĉan vivon. Tial, ni devas kun senlima ardo sin dediĉi al la kaŭzo de paco, strebi por paco, defendi pacon kaj ĉesigi la agresmiliton. Ni, kune kun la pacamantaj popoloj kaj virinoj de la tuta mondo, precipe kun tiuj de la Azia kaj Pacifika regionoj, intime unuiĝu man-en-mane penante senlace por la defendo de paco kaj ĉesigo de la agresmilito. Por pli feliĉa morgaŭo, por nia grandioza idealo, ni marŝu, sub la gvido de Prezidanto Maŭ Ze-tung, laŭ la vojo de la Sovetiaj popoloj kaj virinoj al kompleta liberigo kun plena konfido, kun arda fervoro, antaŭen kaj antaŭen, de venkoj al pli grandaj venkoj.

Trad. Censinio

EL POPOLA ĈINIO

Monata Informa Bulteno Eldonata de Fremdlingva Eldonejo

Redakcio: 26 Kuo Hui Chieh, Peking, Ĉinio

Administracio: 38 Suchow Hutung, Peking, Ĉinio

KVARA JARO N-RO 1

E N H A V O

Bildo sur la kovrilo—Klasika danco de Ĉinio

1953—Komenciĝas Nova Epoko por Ĉinio

Kontraŭ la Neleĝa Rezolucio de U.N.

Masakro de militkaptitoj sur la Insulo Pongam

Mil Milionoj Celas al la Sama Celo

Subjugado de Huaĵ-rivero Marŝas al Pli Granda Venko

La Kulturaj Laborantoj de Ĉinio

Antaŭen Marŝas la Virinoj de Ĉinio

Ĉu privata Entrepreno Povas Prosperi en Nova Ĉinio

La Nova Dommastrino

Nova Spirito en Pekinaj Metiartaĵoj

Kantas Ni la Karan Patrion

La Ruĝflaga Teamo



Kiam la ĝojiga informo pri la paca liberigo de Tibeto atingis la Sikang-Tibetan Altebenajon...

Ksilografajo de Niu Ven
Li Ŝaŭ-jan